Dmitrij Ŝevĉenko
Anna Striganova

# Vojo laŭ maro



ĈIELARKA NEBULO


**Dmitrij Ŝevĉenko**
**Anna Striganova**


# VOJO LAŬ MARO

## Fabela novelo


Eldonejo Impeto

**Moskvo**
**Eldonejo «Impeto»**
**2009**

УДК 811.922
ББК 84Р7-4Эсп
Ш37

E-mail: impeto@impeto.ru

Retejo: www.impeto.trovu.com

ISBN 978-5-7161-0197-5

© Dmitrij Ŝevĉenko 2009
© Anna Striganova, 2009
© «Impeto», 2009



# ĈAPITRO 1

La koro frapegis ĝuste sub la gorĝo, kaj Tim preskaŭ ne aŭdis, kiel ĝi batas. Tim unuafoje en la vivo aŭskultis batadon de sia propra koro, antaŭe la ideo aŭskulti propran koron neniam venus en lian kapon. Amuze estos, se iu el la konatoj ekvidos lin nun. Lin, penantan rekapti spiron post longa kurado tra la matenaj kampoj, lin, sin premintan per la dorso al varma raspeta pina trunko, lin, rigardantan al la maro, post kiu apenaŭ ekbriletis flava strio de aŭroro, lin, ridantan, aŭskultantan batadon de la propra koro. Tim eĉ ĉirkaŭrigardis. Li subite ekvolis, ke iu lin ekvidu, demandu, kio okazis, kaj ke Tim, unuafoje en la vivo, respondu, ke li ne scias. Iu el tiuj, kiuj konis lin kiel serioza klera junulo, avancinta siajn samaĝulojn preskaŭ en ĉio.

"Ĉu vi memoras, kiel mi dum ĉiu interleciono grimpis sur branĉon de la kverko en la korto kaj legis

tie libron post libro? — Tim ridetis, puŝis la dorson de la pino kaj ekiris plu, tien, kie finiĝis la kruta bordo kaj komenciĝis la maro. — Kaj rigardu min nun: saltis el la lito antaŭaŭrore, kuris el la domo, kaj ekstere kvazaŭ mem la malvarmeta luno solviĝis en la aero, kaj ĝia roso brilas sur la herbaro. Kaj kiel do oni tiam ne ekkuru, ne tuŝu malsekajn branĉojn, ne skuigu de ili malvarmajn gutojn. Jes, tiu estas mi, via serioza Tim. Tiu, kiu neniam kuradis, ĉar li ne vidis en tio sencon, tiu, kiu gvidadis post si grupetojn de lernantoj kaj adorantinoj, tiu, kiu malsanadis la tutan vintron kaj al kiu ĉiuj vi alportadis vazojn kun framba konfitaĵo. Kaj tiam mi eĉ decidis, ke venis por mi la tempo foriri, enuego estis, sed ne vivo, kvazaŭ mi ĉion scias, ĉiujn vojojn trairis. Jen al vi ĉiuj. Sed evidentiĝis, ke eblas ne nur iri, sed ankaŭ kuri".

Kaj Tim trisalte atingis la sekvan arbon, eksaltis, ekpendis sur la branĉo, kaj la folioj faligis sur la teron tutan pluvon de la lunaj gutoj. La lastaj el ili, antaŭ ol fali, sukcesis ekvidi ĉe horizonto rondan vilan dorseton de la suno, leviĝanta post la malhela maro kaj blanka nebulo.

La nova ventoblovo duonlevis pezas bluan pelerinon de la pinaj branĉoj, klara lumo de la leviĝanta suno

tranĉis la okulojn de Tim, kaj kune kun tiu lumo preskaŭ ĉe la bordo aperis la ŝipo, kvazaŭ naskiĝinta el brilanta ŝaŭmo kaj aero saturita per varmo. Tim eĉ ne rimarkis, kiel ĝi eldrivis el-post la kabo. Neordinara ŝipo, evidente ornamita por iu festo, ĝiaj veloj estis kudritaj el ora silko. Ĝi kvazaŭ kronis tiun matenon, tian belan kaj sorĉan. Kaj, deŝirante de la kruta deklivo nubojn da rufa sablo, Tim ekimpetis suben, sur la bordon.

Kaj jen li denove staras, rekaptante la spiron, mirigite ĉirkaŭrigardas la brilantan trankvilan maron, sed la ŝipo kun la oraj veloj malaperis. Ĉi-matene nenio jam mirigos Timon, la miraklo atendis lin ankoraŭ ekde mateno, flustris strangajn sonĝojn, vokis lin eliri el hejmo ĉe aŭroro, pelis en la antaŭmatenan aroman arbaron kaj, fine, transformiĝis je la teksita el suno ŝipo kun oraj veloj. Tim iom subenklinas, kaŝante la okulojn de la klara lumo, la ŝipeto kun oraj veloj lumas rekte antaŭ liaj piedoj, eta ludila ŝipo, ferdeko el pina ŝelo, brulanta kandelo kaj peceto de ora pakpapero, ligita al bastoneto-masto. Anstataŭ flago balanciĝas sur fadeno faldita letero. Per tremantaj fingroj Tim malligas la miraklan mesaĝon, eĉ forgesinte pripensi, kial la ondoj ne malsekigis la paperon kaj ne estingis la kandelon. Ja

se vi enlasis la miraklon en la koron, do kredu ĝin ĝis la fino.

"Ĉu vi kredas je la ŝipo kun oraj veloj? Vi tenas tiun ĉi leteron, do vi kredas. Kaj ja ne povas esti aliel. Stelo, falanta surteren, disfalas je du partoj, kaj la partoj iĝas animoj. Mi bezonas stelon por trairi la Vojon, gvidantan laŭ la maro, tial mi ekbruligis kandelon de mia animo kaj lasis ĝin navigi sub ora velo. Kaj la miraklo ekflugis apude. Mi atendas vin sur la Vojo, gvidanta laŭ la maro. Antikva ŝipo de la dioj navigis, forirante en la ĉielon, kaj desegnis ĝin sur la akva surfaco. Ne ĉiu povas iri laŭ ĝi, sed vi havas mian animon, prenu ĝin kaj gardu ĝian fajron. Mia nomo estas Inga".

Kiel bunta kalejdoskopo flugis antaŭ la okuloj la vizaĝoj de knabinoj el lernejo, malgrandaj amatinoj, kiuj portadis al Tim konfitaĵon. Iom pli klare ekflamis en la memoro simpla vizaĝeto de Mari, de tiu, kiun ĉi-vintre forprenis la maro. Tim kredis neniujn stelduonojn, sed interne jam brulis vera incendio, ĝojo pri miraklo kaj vojo, kaj la koro jam delonge impetis al la horizonto. Tim levis la kandelon pli alten, ĝia respegulo aperis surakve kaj etendiĝis plu kiel duondiafana ora vojeto. Kaj nun forgesinte jam pri ĉio, Tim sensuiĝis kaj

ekiris laŭ la akvo, dekomence dronante en ĝi ĝis maleole, poste, kutimiĝinte, tute laŭ la surfaco, eĉ ne malsekigante la piedojn. La vojeto brilis, videbla por okuloj nur je kelkaj paŝoj antaŭen, turniĝis, ĉirkaŭirante ĉebordajn rokojn, kaj la suno leviĝis jam tute alte, kaj ĝiaj radioj ludis unu kun la alia tuŝludon, ruliĝante laŭ ondaj montetoj. Kaj la festo de la hela, sala kaj viva mateno kaptis Timon definitive, deviginte forgesi pri ĉio kaj ĉiuj, unuafoje en la vivo.

***

La bordo ne plu videblis. La entuziasmo iom elĉerpiĝis, volviĝinte interne kiel varma buleto, la suno iĝis malpli hela, rufa, antaŭvespera, la laco komencis superi. La pale-flava vojeto same iom videblis antaŭe, kaj, forlasinte la lastajn dubojn kaj timojn, Tim eksidis por ripozi, merginte la nekutimiĝintajn por longa irado piedojn en malvarman maran akvon. "Jen do vi ricevis, kion vi volis. Ĉu en la vivo nenio novas? Pardonu, Tim. Vi iras laŭ la vojo, kiu ne povas ekzisti, al la knabino, kiun, verŝajne, elpensis. Vi unuafoje en la vivo honeste konfesas, ke vi nenion komprenas, kio estas la morto kaj

la vivo kaj ke vi vivas. Vi tiel komprenas, ke la spiro haltas. Kaj samkiel antaŭe vi babilas kun vi mem”. Tim fermis la okulojn kaj ankoraŭ longe pensis pri ĉio, kio okazis, pri si mem, pri la miraklo, pri la vojo. Poste li ekdormetis.

— Tim, mia kara, mia amata Tim! — La junulo duonmalfermis la okulojn, rozkolora lumo de la sunsubiro ankoraŭ superverŝis la maron ĉirkaŭe, kaj la ĉielo iĝis nokte violkolora. Rekte antaŭ li sur la ondoj balanciĝis la boato, en ĝi sidis Mari, malgranda, magra, en simpla blanka robeto. Tiam, antaŭlonge ŝi brodis tukon por Tim, sed poste ŝi foriris promeni ĉe la maro, kaj neniu plu vidis ŝin. Tiam Tim volis plori kaj memori ŝin ĉiam, sed nek tion, nek alion li sukcesis, la memoro ne konservis eĉ ŝiajn vizaĝtrajtojn. Sed nun ŝi sidas antaŭ li tutsama, kia ŝi estis, kun la sama timigita-feliĉa vizaĝo.

Kaj tra ŝia travidebla korpo aperas sunsubire forbrulanta horizonto.

— Nur ne ploru pri mi nun, kara Tim, — ŝi rimarkis, kiel ekbriletis larme liaj okuloj. — Vi pensis, ke mi dronis en la malvarma vintra maro, sed mi donacis al vi tuketon kaj estis feliĉa pro tio, ke mi finfine kuraĝis aliri

vin, ekparoli kun vi, do mia animo impetis el la brusto. Sed la animo ja estas kandelo, kiu povas lumigi eĉ la plej kaŝitan vojon. Do jen mi ekvidis la vojeton inter la maraj ondoj.

Tim eksaltis sur la piedojn, vigligita de la ĝojiga penso. Mari estas viva, ŝi simple ekiris la saman Vojon, kiu gvidas laŭ la maro, nun li iratingis ŝin, kaj ili pluiros kune. Sed la feliĉo tuje estingiĝis, li ekvidis la oranĝkoloran rondon de la subakviĝanta suno, ekvidis ĝin tra la korpo de la knabino, sidanta en la boato. Tra ŝi.

— Mari, ankaŭ mi… ankaŭ mi estis tiam tre ĝoja, mi konservis vian tuketon, ĝi ankaŭ nun tie, hejme estas, mi… — Li jam volis paŝi en ŝian boaton, sed ĝia ligna fundo solviĝis, kvazaŭ malpeza nebulo, kaj Tim apenaŭ ne falis en la maron. La vizaĝo de Mari ne ŝanĝiĝis — nek timo, nek sopiro, nek ĝojo. La sama esprimo de feliĉo, sed en la okuloj — malpleno.

— Ĉu vi pereis, Mari? Ĉu la Vojo baldaŭ malaperos? Aŭ vi estas sonĝo?

— Mi ne scias, ĉu malaperos la Vojo, Tim. Mi iris laŭ ĝi nur kelkajn minutojn. Poste mi komprenis, ke ĉio ĉi ne povas esti, ke mirakloj estas nur en fabeloj.

Jen do ĉio, mi falis. Ni multas ĉi tie, ni estas fantomoj de la Vojo. Ĝin ne eblas lasi, se vi foje paŝis sur ĝin, al ĝi ne eblas reveni, se vi foje ĝin lasis. Tial ni estas ĉi tie poreterne. Tiel trankvile estas ĉi tie, vidu, mi eĉ ne ĝenas min paroli kun vi. Tiu ĉi Vojo ne povas ekzisti, komprenu, kara Tim, iru kun ni!

Io malica kaj malagrabla pikis Timon ĝuste en la koron. Kaj li ekvolis kuri for de tiu fantomo, nun ekŝajninta terure, neklarigeble fremda. Lin atendas la Vojo, lin gvidas la miraklo, lin vokis Inga kun la ora ŝipeto.

La suno malaperis post la horizonto, kaj la maro subpiede subite eklumis. Miloj da helbluaj lanternetoj ekbrilis en la travidebla akvo, lumigante la palan fundon, perlamotajn konkojn, arbarojn de verdaj algoj… kaj centojn de travideblaj homoj en blankaj vestoj. Ĝuste ili tenis lanternojn en la manoj, ili ridetis, naĝis unu al la alia, kunvenante en rondon. Kiam ĉe horizonto malaperis la lastaj radioj, la lanternoj eklumis ankoraŭ pli forte, malfermiĝis aloj de la subakvaj konkoj, liberigante etetajn marajn elfojn. Ili selis arĝentajn fiŝetojn kaj rajdadis vete, suprenigante milojn da lumantaj veziketoj. El densa algaro, brilante per skvameroj de la vostoj,

leviĝis la verdaharaj marvirinetoj, tenante en la manoj spiralajn konkojn. Supreniĝinte preskaŭ al la surfaco, ili metis la konkojn al la lipoj, kaj sovaĝa terureta muziko plenigis la nokton. Fantomoj, elfoj kaj arĝentaj fiŝetoj ekturniĝis en unu grandega brilanta rondodanco.

— Ni iru, kara Tim, ĉi tie estas nek doloro, nek timo, venu kun mi.

Tiaj ĉarmigaj fajretoj, tia belega fundo, priŝutita per konkoj. Kiel simple estus forgesi la lernejon, junulinojn, lernejanojn, la ŝipon kun oraj veloj — scii nenion, simple ekkredi, ke la Vojo ne ekzistas, kaj resti ĉi tie por ĉiam. Tim jam staris en akvo ĝisgenue, la Vojo malleviĝis, blanka mano de Mari estis etendita al li. Ŝi tiel amas lin, kaj li estos kun ŝi ĉiam. Agrabla langvoro kaptis lian animon, li ekis antaŭen. Lasta puŝo — ekvidi ŝiajn okulojn, tiajn bonvolajn, ĝuste ilin li ne forgesis. Tim levis la kapon. Kaj renkontis la malplenan rigardon de la fantomo. Indiferentajn fremdajn okulojn. La dolĉa langvoro malaperis. Tim rekonsciiĝis, forturniĝis kaj malrapide ekiris foren, afable ekflamis la ora kandelo en lia mano. Lin atendas la Vojo, lin atendas Inga. La fantomo malantaŭ li ankoraŭ minuton rigardis al li, poste same indiferente malleviĝis en la akvon, solviĝinte

en komuna rondodanco de elfoj, fantomoj kaj bluaj lanternoj.

Kaj jen jam la freneza mara balo restis fore malantaŭe, la mara surfaco iĝis velure-nigra, kaj la malamon kaj maltrankvilon anstataŭis kvieta laco. Tim kuŝis, tutkorpe etendiĝinte sur la Vojo kaj rigardis la stelojn. Atlaso de la stela ĉielo estis la unua libro, pri scio de kiu li fanfaronis antaŭ la geamikoj, kaj nun li serĉis en la alto konatajn konstelaciojn, penante almenaŭ iom deflankiĝi de la ĉi-tagaj eventoj. La matena sento de facileco kaj la deziro kuri malaperis senspure. La Vojo laŭ la maro evidentiĝis esti tro reala, kaj la iro laŭ ĝi jam ne ŝajnis facila. Ĉu ĝi subakviĝos, farinte lin, Timon, fantomo kun malplenaj okuloj? Kien ĝi gvidas, kaj kio atendas lin en la fino? Ĉu vere ekzistas Inga, kio ŝi estas, de kie ŝi povis ekscii, ke ekzistas li? Sed la steloj afable trembrilis, tute samkiel hejme, en mola bluo balanciĝis la figuro de la Granda Ursino, la laco superis lin. Tim kuntiriĝis kaj, varmiĝinte, ekdormis, ne sukcesinte rimarki, ke la gastama Vojo sub lia korpo iĝis mola, kvazaŭ somera nubeto.

***

La mateno estis malserena. Tim vekiĝis pro frosto, abomene kaptinta lian tutan korpon. Frosto ĉiam kunportas malcertecon kaj timon. Kaj se ekos tempesto? Kiel terure la ondoj levados kaj mallevados mincan strion de la Vojo! Aŭ entute disŝiros ĝin je pecetoj… Tim tuj forpelis tiujn pensojn. La hieraŭa vespero memorigis al li unu gravan regulon de ĉiuj fabeloj en la mondo: se vi ekiris por miraklo, bonvolu ne dubi pri ĝi, aliel ne atendu indulgon. Krome, la kandelo daŭre brulis, montrante la vojon. Tim iom kuretis por varmiĝi, kaj poste ekiris trankvile. La kutimo pensi ĉie kaj ĉiam ne lasis Timon ankaŭ ĉi tie. “Inga… Mi ja delonge ne kredas, ke inter homoj povas esti io efektive grava… Mi volis ami Mari, sed forgesis ŝin… Mi volus memori ĉiujn, kiuj vizitadis min vintre, dum mi malsanis, sed mi apenaŭ nomus eĉ duonon. Neniu ion ŝanĝos. Ami kaj amiki eblas nur ĝis vi nenion scias, ĝis vi ne komprenas aliajn homojn, simple elpensas iliajn aspektojn. Mi ne zorgu pri Inga. Simple mi trovis en la vivo tion, kion mi ne konas. La Vojon. La sola, kion mi volas, — estas trairi ĝin ĝisfine”.

— Sed se ĝi ne havas la finon?

Tim stumblis je propra piedo kaj apenaŭ ne falis en la plumbe-grizan maron.

— Mi ja silentis, ĉu vi pensojn legas, do?!

— Ja necesas almenaŭ pri io okupiĝi ĉi tie…

La kunparolanto estis junulo ĉirkaŭ deksepjara, samaĝulo de Tim. Iom maldika, minca, vila, li sidis, submetinte sub sin la krurojn, kaj penis rideti. Tamen li sidis en malgranda, fera, kiel por sovaĝa besto, kaĝo, balanciĝanta sur ĉeno. La ĉeno leviĝis al la similantaj grizan fumon nuboj.

Tim faris paŝon malantaŭen — tiu ĉi estas pli terura ol la hieraŭaj fantomoj. La korpo de la junulo estis same diafana, sed en la okuloj anstataŭ indiferento estis tia ĉagreno, ke Tim ekvolis plori. Eble, indus fuĝi, kiel hieraŭ, sed Tim denove vidis tion, kion li ne sciis. Do endis ekscii.

— Sed se la Vojo ne havas finon, frato?

— Do mi ĉirkaŭiros la Teron kaj revenos.

— Stulta, ĉu vi ankoraŭ ne komprenis, ke la Vojo havas nek spacon, nek tempon. Kiel tion koncernas la Tero?

— Ankaŭ vi, kiel mi vidas, sendolĉe vivas, fantomo de la Vojo.

— Ne juĝu pri tio, pri kio vi ne havas imagon! — rebatis la junulo. — Iru, kien vi volas, mi kraĉu.

Tim sidiĝis, montrante, ke li ne intencas foriri. Ekpluvetis. Kelkajn minutojn ili sidis en silento. Poste la fantomo ekparolis:

— Vi havas du animojn. Kaj kune ili estas stelo. Vi preskaŭ tenas ĝin en la manoj, ĝia sorĉa lumo ludas sur la Vojo. Kaj vi pensas, ke ĉiam estos tiel, ĉu?

— Mi ĝenerale nenion pensas kaj scias nek pri la kandelo, nek pri la Vojo.

— Sed mi scias. Mi ja ne havis kandelon, mi iris palpe, mi tre volis ĝisiri… Ŝia nomo estis Mari. Ŝi iris rapide, kuris antaŭen, kaj mi trenis min post ŝi. Blinde, du paŝojn tage… Kaj poste mi komprenis, ke mi neniam atingos ŝin, ke tiu damnita Vojo ne havas finon. Mi frostis, tre frostis…

La junulo kuntiriĝis, kovrinte la vizaĝon per la gratitaj polmoj. Do ankaŭ fantomo povas gratvundi polmojn, provante rompi vergojn de la besta kaĝo.

— Kaj? — Tim leviĝis kaj venis pli proksimen al la kunparolanto.

— Kaj mi saltis suben, en la maron, tian varman, molan. Poste rekonsciiĝis ĉi tie. La Vojo ne havas finon, frato, ĝin ne eblas lasi.

— Ne eblas, se ne atingi la finon. Sed mi atingos.

La timo donis al Tim fortojn.

Ili ankoraŭ longe silentis, poste la junulo ŝovis la manon tra la krado, kunpreminte la ŝultron de Tim.

— Se… Se vi hazarde trovos ŝin, mian Mari… Diru al ŝi, ke mi iris. Bonvolu.

La mano, kunpreminta la ŝultron, estis varma, la fantomo de la Vojo estis viva. "Ne lasu Dio, ke vi eksciu, kie estas via Mari. Vi trairis pli malproksimen ol ŝi, de ŝi venas nur frosto", — pensis Tim.

— Jes, mi diros al ŝi.

— Dankon… Vidu, estis minutoj, kiam mi amis la Vojon… Kaj… Komprenu, tio, kion vi amas, devas havi nek komencon, nek finon.

— La Vojo havas finon, kaj mi iras al ĝi. Mi nenion kaj neniun amas, — decideme respondis Tim. La junulo nur ridetis.

— Restu ankoraŭ… Malvarmas ĉi tie, mi havas kandelrestaĵon, simplan kandelrestaĵon, sed fajro mankas.

Tim etendis al la junulo la kandelon.

— He, frato, tio ne estas via animo, vi ne povas dividi ĝin kun iu.

La fantomo proksimigis sian manon al la brusto de Tim, kaj post kelkaj sekundoj la kandelo iomete eklumis. Tim rigardis al la kunparolanto kaj ne rekonis lin: tia bona, ĉarma kaj malfeliĉa ŝajnis li nun. Larmoj ektremis en la okuloj de Tim.

— Kio do tio? — Li senhelpe kunpremis la fingrojn. — Mi neniam-neniam ploras!

— Vi fordonis al mi parton de la animo, al vi estas dolore, ĉar vi fordonis parton de vi mem, ĝuste tio estas amo, kiun vi ne kredas. Sed pro la amo oni ĉiam ploras. Nun iru.

Tim obeeme antaŭeniris, tuj kaj tuj rerigardante. Kaj, eble, kulpis la nebulo, eble, la larmoj ankoraŭ plenigantaj la okulojn, sed subite al li ekŝajnis, ke la kaĝo iĝis iom pli travidebla kaj io nova, akra, ĝoja pikis la koron. La junulo preskaŭ malaperis en la griza nebulo, kiam Timon atingis liaj vortoj:

— Via Inga havas rufajn harojn kaj grizajn okulojn! Kaj la antaŭa kandelo, kiun mi forbruligis, brulis de ŝia fajro!

***

La Vojo laŭ la maro definitive ĉesis esti ludo, ĝi ŝanĝadis Timon, ŝanĝadis sendevie. Tim ekde infanaĝo

malestimis sinmortigantojn. Se vi ne havas fortojn por vivi, do ne indis, ke vi naskiĝu, kaj vi ne indas eĉ la plej malbonan rememoron. Sed la Vojo decidis aliel. Unuafoje en la vivo Tim sentis, ne volis senti, sed ĝuste sentis, ke ies sorto firmege ligiĝis kun lia sorto, ke aperis la homo, kiun li memoras. Kaj eĉ terure iĝis pro tio, kiel simple, kaj krome kun lia konsento, okazis tio, kion li ne kredis ekde la mondokomenco.

Malgranda duonringo, simila al ĉielarko, leviĝis super la hela strio de la Vojo. "Ĉu la nova aventuro? Ĝi ĝojigas min. La Vojo ne ripetiĝas, la Vojo havas finon, kiun mi certe atingos". Proksime la duonringo ĉesis ŝajni ĉielarko, kaj, diference de ĉio antaŭe renkontita ĉi tie, ĝi ne estis travidebla. Baldaŭ Tim distingis tutsupre belan kun brilanta kaj respegulanta skvamaro drakan kapon. La ĉielarko evidentiĝis esti la belega, kvazaŭ sur la bildo de la infana libreto, mara drako, englutinta propran voston. Foj-foje la besto sin tiris antaŭen, suprenlevante blankan akveraron, sed nur senhelpe turniĝis ĉirkaŭ la Vojo, jen plonĝante kape en la akvon, jen eksorante en senforta provo ŝiri la pal-oran strion kaj liberiĝi. Tim senpove mallevis la okulojn.

Poste, pli proksime al la griza, eĉ pli malserena ol la mateno, tagmezo, Tim ekvidis ĉe horizonto la

insulon: malafablan peceton de roko, elstaranta el la maro, superkreskita de muskoj kaj nordaj, violkoloraj erikoj. Kvankam Tim iris la Vojon nur dum unu tago, li jam sopiris pri la tero, floroj, printempa, varma grundo, kaj li infanece ekĝojis, kiam li rimarkis, ke la vojo ĉirkaŭas la insulon kiel maŝo kaj nur poste iras plu, en la grizan, maltrankvilan maron. Ĉirkaŭirante la insulon, Tim iratingis nejunan sinjoron en multekosta kostumo. La lasta estis tiom enpensiĝinta, ke li eĉ ne rimarkis lin.

— Bonan tagon! — Tim ridetis, antaŭsentante novan lecionon, kiun instruos al li la Vojo.

— Kaj al vi bonan tagon, juna sinjoro!

— Kia bela erikaro, tie, sur la insulo, ĉu ne? Se mi ne timus perdi la Vojon, mi nepre naĝus al ĝi, sidus sur la tero, kolektus florojn. Eble, tie, interne, eĉ la fragoj jam maturiĝis. Aŭ fruas ankoraŭ, kiel vi pensas?

— Eĥ, infanoj-infanoj, — tute oldulmaniere suspiris la kuniranto. — Vi ankoraŭ eĉ ne sukcesis ellerni, ke ĉiuj floroj kaj beroj estas tute similaj, kaj ankaŭ la insuloj, kaj vivoj, kaj vojoj. Vi iras al io nova, sed venas tien, de kie vi komencis la vojon. Kaj, ĝenerale, eĉ ne estas diferenco, ĉu vi vivis aŭ ne.

La viro elprenis el la poŝo de la jako ĉifitan cigaron kaj portis ĝin proksimen al sia brusto. La cigaro nevolonte, malrapide ekbrulis. Ankaŭ tio estis fajro de la animo, kaj, eble, ĝi estis la lasta cigaro, por kiu sufiĉis la fajro.

Unuafoje dum la tempo, pasigita sur la Vojo, Timon kaptis vera teruro. Ja li mem, Tim, ankoraŭ unu tagon antaŭe absolute certis, ke ĉiuj liaj geamikoj similas, ke en la mondo ne ekzistas diversaj floroj kaj beroj… Aspektus bone li post kelkaj jaroj, ekfumanta cigaron de la estingiĝanta fajreto de la propra, al neniu apartenanta animo… La vojo tre proksimiĝis al la insulo, kaj io tuŝis Timon je la vizaĝo. La branĉeto de eriko, rozkolora eriko. Tim ŝiris ĝin, por konservi por tiu terura tago, kiam al li denove ŝajnos, ke ĉiuj floroj en la mondo similas. Tim kaj la maljuna sinjoro ĉirkaŭiris la insulon. Tim rapidis plu, sed la kunvojano ne sekvis lin, li denove revenis al la maŝo. Kaj tiam Tim unuafoje rimarkis, ke tra ties korpo kaj kostumo li vidas blankan strion de la nebulo surhorizonte. Ne homo, plia fantomo de la Vojo.

— Kien vi? Ja vi iras laŭronde, sed la Vojo gvidas tien, foren.

— Ajna vojo gvidas laŭronde, knabo.

— Mi ĵus vidis la maran drakon, jen ĝi efektive estas kondamnita por la eterna rotacio laŭ la rondo, sed vi estas libera!

— Ni ĉiuj estas kondamnitaj, ankaŭ vi.

— Nenio simila! En la mondo ne ekzistas du samaj floroj, kaj ĉiu tago, de ni travivita, jam neniam ripetiĝos. La Vojo ne estas rondo. Ĝi havas la komencon, do ĝi havas ankaŭ la finon. Tim premis al la brusto erikbranĉeton.

Samsekunde la Vojo ektremis pro fortega tondro, la fulmo ŝiris grizan ĉielon. Kaj poste suronde glitis io granda, hela. La mara drako levis sin super la akvo kaj, belega, libera, ekflugis al la horizonto.

***

Tim iĝis pli kaj pli meditema, la Vojo laŭ la maro akiradis pli kaj pli seriozan sencon. Gaja okupo dum horo de anima enuo transformiĝis en aventuron, kies prezo povis iĝi la vivo. Nun tiun aventuron eniris aliaj homoj. Tie, surtere eblas eniri domon de la homoj, kaj

eliri el ĝi, ne lasinte spuron. Sed tie ĉi renkontiĝis ne homoj, sed sortoj, kaj ĉiu lasis en la alia neforigeblan spuron. Antaŭe Tim sciis kaj komprenis ĉion, nun li vidis nur strieton de lumo surakve — kelkajn paŝojn antaŭen kaj kelkajn paŝojn malantaŭen. Kaj la Vojo plaĉis al Tim pli kaj pli, kutime enpensiĝema kaj preskaŭ moroza, nun li ĝojis, ke li vidas ĝin, ke al li sufiĉas fortoj iri laŭ ĝi, ke lia korpo ankoraŭ plenas je fortoj, ke li neniam iĝos travidebla, li ne estas fantomo de la Vojo, li kredas ne nur je tio, ke la Vojo ekzistas, sed ankaŭ je tio, ke ĝi havas finon, ke ĝia ekzisto mem havas sencon.

La ĉielo estis ankoraŭ malserena, tial la krepusko venis frue, sed eĉ la fojfoje gutetanta pluveto estis sentruda kaj varma. Fakte, samkiel dum ajna griza tago, la tempo pasis iom pli longe, ol ĝi pasas kutime, Tim preskaŭ ekenuis, sed baldaŭ ekvidis antaŭe alian vojiranton. La junulo kun kravato kaj okulvitroj, glate kombita kaj pure razita, sidis rande de la Vojo kaj skribis ion en la metita sur la genuojn kajero. Tim scivoleme rigardis trans lia ŝultro, la kvadratita papero estis plenskribita per formuloj. La junulo eĉ ne rimarkis, ke iu venis. Li abrupte substrekis la ricevitan rezulton kaj saltis sur la piedojn, kolere tradentis:

— Ne, la Vojo laŭ la maro ne ekzistas, ĝi ne povas esti!

Tim atendis, ke la Vojo malaperos sub la piedoj de la junulo-matematikisto, tio estas la leĝo de ajna fabelo. Tim nur ĵus rememoris ĝin. Sed la junulo staris sur la Vojo, kaj la mara akvo ne tuŝis eĉ liajn ŝuplandojn.

— Vi staras sur la Vojo kaj ne kredas, ke ĝi ekzistas, ĉu? — informiĝis Tim.

— Pli malbone! — la kunparolanto furioze ĉifis la kajerfolion kaj svinge ĵetis ĝin en la maron, tiom malproksimen, kiel li povis. — Ĉu vi renkontis jam tiun suicidulon, kiu sidas en la kaĝo? Li plu revas trovi sian knabinon, kiu kvazaŭ atingis preskaŭ la finon de la Vojo.

Tim ekvolis svinge vangofrapi la junulon, ne li juĝu pri tio, okulvitrulo-matematikisto. Sed la scivolemo estis pli forta:

— Jes, mi renkontis, — respondis Tim.

— Do jen, li legas la pensojn de ĉiuj preterirantoj, scias, ke lia Mari estas la plej neglektinda el la fantomoj, rondodancanta kun marvirinetoj komence de la Vojo. Kiel mi mokridis pri li, kiel mi lin malestimis! Kiel eblas kredi je io, kiam vi ĝuste scias, ke ĝi ne ekzistas kaj ekzisti ne povas?! Deliraĵo…

— Sed ja almenaŭ io devas subteni lin… — Al Tim iĝis netolereble malĝoje, kial li mem povis ne ekvidi tion, ne paroli pri tio kun la junulo, kiu nun estas ligita kun li por ĉiam?

— Mi plej multe en la mondo malŝatas homan stultecon. Malamegas! Mi trairis ankoraŭ malmulte, mi ne volis dormi, mi decidis okupiĝi pri la ŝatata afero — solvado de fizikaj kaj matematikaj taskoj. Kaj tiam mi hazarde pruvis, ke la Vojo ne ekzistas. Tio ĝenerale ne povas esti. Mi freneziĝas, mi rekalkulis kelkcentfoje, mi timas pensi, kiom da jaroj pasis, sed tiu damnita Vojo ne deziras malaperi! — Kaj la junulo tutforte piedfrapis. Se la Vojo ne estus teksita el apenaŭ distingebla lumo, sed envere estus materia, ĝi verŝajne rompiĝus, tiom da fortoj kaj malamo li enmetis en tiun frapon.

Poste la junulo reeksidis, prenis la kajeron kaj komencis kalkuli. Tim sidiĝis apude, decidinte permesi al si iom ripozi. La junulo longe skribadis, poste levis la lacajn okulojn al la grizaj nuboj. Lia rigardo ŝanĝiĝis, li ne simple rigardis, li admiris la densan nebulon, maron, ekpendintan enfore striitan pluvan pelerinon. “Amuza sorto, — pensis Tim, — freneze ami kaj kredi ion kaj

malŝpari la tutan vivon por pruvi al si: tio, kion vi tiel amas, por vi ne ekzistas”.

— Vi, verŝajne, opinias, ke mi estas absoluta idioto, ĉu? — li denove ĉifis en la mano plenskribitan kvadratitan folion. — Nu kiel, kiel eblas kredi je tio, kio ne ekzistas!

Tim silente ŝultrumis. Malheliĝis, tempis serĉi lokon por noktumado, kaj noktumi kun tiu stranga junulo li ne emis. Kvankam ankaŭ tiu estis siamaniere malfeliĉa kaj siamaniere prava, sed Tim jam komencis vidi la principon de la Vojo. Li postrigardis nur unufoje, por vidi, ĉu la horizonto videblas tra la korpo de la matematikisto, ĉu li jam iĝis la sama fantomo de la Vojo, kiel ĉiuj antaŭaj renkontitoj. Sed la krepusko jam densiĝis super li, kaj ekzakte respondi al sia demando Tim ne povis.

Tamen la aventuroj de tiu tago ankoraŭ ne finiĝis. Rekte antaŭ Tim, sur la lumanta strieto de la Vojo staris kruda ligna pordo kun fera tenilo. Fermita pordo. La humoro estis brava, bona, li eĉ imagis, kiel amuze de tie supre aspektus kverka pordo, staranta marmeze. Ajnokaze, ja eblas plonĝi en la maron kaj elplonĝi de alia flanko. Ja Tim bonege naĝas. Kvankam li jam sciis,

ke tion li ne bezonos. Se eĉ erikoj surinsule kreskis ne simple tiel, do ankaŭ la pordo havas sencon. Jes, ĝuste tiel, la aŭdon de Tim, aŭ al li tio nur ŝajnis, atingis la flustro: "Fermu la okulojn, rememoru la Vojon kaj diru, kion vi komprenis pri ĝi, trairinte ĝian unuan parton". Tim fermis la okulojn.

— Je la Vojo necesas kredi — se vi dubos — do vi tuj por ĉiam iĝos fantomo, — la pordo knaras, sed ne malfermiĝas. — Necesas kredi, fidi al la Vojo, ĉiam vidi en ĝi sencon, — faras la novan provon Tim. La pordo iom malfermiĝas. — Ĉar vi povas kredi aŭ ne kredi kaj ne endas serĉi ion mezan. Tute nenion.

Post la plene malfermita pordo la Vojo iĝas iom pli larĝa, enfore videblas lumturo. Tim kuŝiĝis, ankoraŭ kelkajn minutojn rigardis al ĝia afabla rufa lumeto, poste dolĉe ekdormis, denove ne rimarkinte, kia mola iĝis la Vojo sub lia dorso.



# ĈAPITRO 2

Tim ne sciis, kiom da tagoj pasis, ekde kiam li surpaŝis la Vojon. Tim ne sciis, ĉu estis en la mondo io, krom tiu Vojo, ĝia pala lumo, ĝiaj vojirantoj kaj ĝiaj fantomoj. Por Tim — ne estis. Li ĝisiros la finon, li povos, ja li neniam dubis pri sia eliteco. Kaj ankoraŭ ie ĉi tie, eble, jam tre proksime, lin atendas Inga. Ŝi havas rufajn harojn kaj grizajn okulojn. Ŝi ne portados al li framban konfitaĵon, ŝi ne amkonfesos al li kun larmoj en la okuloj. Ŝi sendis al li ŝipon kun oraj veloj, ŝi montris al li la Vojon, ŝi fordonis al li la animon. Eble, la plej grandan en la mondo, kion eblas fordoni.

Iom antaŭe, sur la Vojo aperis duopo, junulo kaj junulino, ili pri io interparolis, vigle, arde, ŝi ploris, li fojfoje altigis la voĉon. Ili eĉ ne rimarkis atingintan ilin Timon.

— Vi insistas pri tio, kion mi ne povas kompreni. Mi posedas liberon, kaj mi faros tion, kion mi volas.

— Sed ĉu mi malhelpas al vi?

— Jes, vi volas, ke mi perdu min, ke mi ĉesu esti vaganto, forgesu la Vojon. Sed tio estas mia vivo.

— Sed mi povas iri kun vi.

— Vi tion ne volas, vi iras kun mi nur por tio, ke mi sentu min kulpa!

Ili plu iras silente, poste li haltas, poste — ŝi.

— Pardonu, ĉu vi volas, ke mi ĉion lasu, por esti kun vi?

Nun ŝi subite iĝas serioza, ĉesas plori.

— Nenio rezultiĝos, tiam vi malaperos, vi ne povas, ne devas forgesi la infanan revon, tio estas la plej grava, kio estas en la vivo.

Li provas preni ŝian manon, sed batiĝas kontraŭ nevidebla muro.

Tim venas al li.

— Ĉu vi delonge iras tiel?

— Delonge, eble, kvin jarojn, eble, dek, eble, la tutan vivon… Kaj ankoraŭ eĉ unufoje ne tuŝis unu la alian, la muro ne lasas. Ĉu vi vidas — la muro?

— Sed kial vi ne lasu unu la alian?

— Ni tro longe iras kune, ni ne povos, ni mortos unu sen la alia. Ŝi volas, ke mi iĝu alia, sed persiste diradas al mi la malan.

— Se ŝi diros veron — ŝi perdos vin. Sed ja iu devas rompi tiun nevideblan muron, ĉu ne?

— Jes… Jes, sed ne nun. Mi ne povas… Ni ne povas unu sen la alia. Iru vian vojon.

Kaj Tim iras.

Li postrigardis al ili ankoraŭfoje, ili iris jen antaŭen, jen malantaŭen, dividitaj per la nevidebla muro, travideblaj fantomoj de la Vojo.

Tim, mergiĝinta en siaj pensoj, stumblis kaj apenaŭ ne falis.

— Singarde, knabo, rigardu sub la piedojn. Pri kio vi enpensiĝis? — Demalsupre supren lin rigardis la junulo kun ruĝa kravato kaj kvadratita kajero. Matematikisto. Tiu sama. — Jes-jes, estas mi, ne miru, mi vin antaŭis, dum vi dormis.

— Kaj nun kiun vi atendas? — Tim sidiĝis apude, lasinte la piedojn en la akvon.

— Ĉu vi vidis du geamantojn?

— Jes, ĝuste pri ili mi pensas…

— Inter ili ne ekzistas muro. Mi serĉis ĝin palpe, mi faris kalkulon. Ĝi ekzistas nek teorie, nek praktike. Kiel ja mi malamas la homan stultecon!

— Ĉu vi multon komprenas pri la muroj inter homoj?.. Kalkulon li faris! Ankaŭ mi ne komprenis, sed mi ekvidis ilin kaj… Vidu, sur la Vojo ĉiuj sortoj estas iel ligitaj, kvazaŭ vivojn de ĉiuj renkontitaj homoj mi travivis mem. Sed, eble, eĉ travivis. Vidu, ĉiu homo estas tutsola, malgraŭ ke li trompadas sin pri la kredo je amikeco kaj amo.

La okuloj de la matematikisto ekbrilis:

— Aha, finfine prudentaj vortoj, kaj vi kompenas! Tia deliraĵo ne povas, ne devas esti. Science pruvite!

— Ĉi tie estas nenio por pruvi. Interne, en la profundo de la animo ĉiu homo estas sola, neniu ekscios kaj neniu venkos liajn sekretajn timojn, liajn revojn. Neniu savos, neniu protektos. Ĉiu vidas en la alia nur obstine rezistantan respegulon de si mem. Fremda vero ĉiam estas malvero, sed ĉiuj havas propran veron.

— Kaj estas senco pluiri, nur kompreninte tion, ĉu jes? — La matematikisto etendis la manon al Tim.

— Mi ĉiam tion sciis. Aŭ vi estas sola, aŭ malfortulo, fantomo, ne gravas, sur la Vojo, aŭ — ne.

Kaj se vi subite ekvidos vin kiel ies obstinan respegulon, do vi simple malaperas. Eblas pluiri, nur akceptinte tion. Tim sin apogis je la mano de la matematikisto kaj leviĝis.

— Do estingu la kandelon.

Frosteto kuris laŭ la dorso de Tim. Baldaŭ venos nokto kaj sur la Vojo ne restos alia lumo.

— Stultulo, — la matematikisto kolere forpuŝis Timon. — Samkiel ili. "Mi scias, ke mi ne estos kun ŝi, sed mi batiĝos per la frunto kontraŭ muro, kiun mi elpensis mem". Batiĝu, diablo kun vi!

Tim sidis ĉerande de la Vojo, kaj ĉe horizonto la subiranta suno inundis la mondon per rufa lumo. La ĉielo jam malheliĝis, varma lumeto de la kandelo varmigis la etenditan super ĝi polmon de Tim. Tim provis malestimi sin, volis senti sin mizera kaj malforta, sed tio ial ne sukcesis. En la animo estis trankvile kaj hele. "Mi ne volas kredi je tio, ke mi ne estas sola. Mi neniam trompos vin, dirinte al vi, ke vi ne estas sola. Sed estingi la fajron de via animo mi ne rajtas". La suno etendis supren la lastan malhel-rufan radion, per malhel-rufa lumo ekflamis la kandelo. Sur la teron descendis varma, julia vespero.

***

Estis ordinara nokto, nur eble iom sufoka, sed io maltrankviligis Timon, malhelpante kviete ekdormi. Poste li komprenis: sur la ĉielo videblis nek la luno, nek la steloj. Do, denove nuboj. Kaj la sufoko subite iĝis preskaŭ netolerebla. La tuta korpo de Tim pleniĝis per neklara antaŭsento, besta antaŭsento de tempesto. Kaj efektive, malproksima fulmorebrilo lumigis la ĉielon, en ĝia kurta terureta lumo la peza, malalta ĉielo ekŝajnis al Tim malhel-ruĝa. Malvasta strieto de la Vojo subpiede, fajreto de malgranda kandelo en la manoj, malhela senfina maro, kaj en ĝiaj ondoj, nun li sciis, — rondodanco de marvirinetoj kaj indiferentaj travideblaj fantomoj.

Nova fulmorebrilo lumigis la ĉielon kaj la maron. Poste Tim rimarkis kelkajn fajretojn en mara profundo, ili leviĝadis. Baldaŭ la ondo disiĝis kaj sur la surfacon leviĝis areto de mirindaj buntaj fiŝetoj, kun travideblaj, similaj je tre grandaj naĝiloj, flugiloj. Ili estis kelkdek, ĉiu surhavis bridon kaj selon kun tintiloj, surfrunte — ronda, simila flavan globon, lanterneto. Sur la fiŝoj rajdis maraj elfoj, malgrandaj hometoj en kostumoj el algoj, en

pintaj spiralaj konkoj-ĉapetoj. Tiu hela kaj argabla vidaĵo pormomente delogis la junulon, forigis lian timon. Unu el elfoj apartiĝis de la areto kaj alflugis la Vojon.

— Ĉu Tim jam estas fantomo? — La elfo lasis la bridon kaj stariĝis en la selo, apoginte la manojn je la verdaj korpoflankoj kaj flankenklininte la kapon. Li kun intereso observis la junulon, kaj poste serioze konkludis: — He, ne, Tim tute ne estas fantomo. Tim tiom lumas per la vivo, ke eĉ doloras rigardi. — La elfo demetis la konkon-ĉapon kaj riverencis. — Kaj ĉu Tim scipovas flugi?

— Ne, ja mi estas homo, vi mem diris. Kaj de kie vi konas min?

— Inga diris pri vi. La elfoj leviĝis el sub akvo, ĉar ili timis tempeston, sed Inga iris laŭ la Vojo. La tempesto komenciĝis pli frue. Kaj unu elfo falis de la fiŝo. Inga levis lin, prenis en la manojn, ili ambaŭ saviĝis. Tiam la elfo demandis, kion li povas fari por danki ŝin, kaj Inga petis helpi al Tim, se li trafos en danĝeron.

— Tiu elfo estas vi, ĉu?

— Jes. Elfo helpos al Tim per konsilo. Baldaŭ estos tempesto, ĝuste en tiu ĉi loko ekturniĝos la akvo, estos akvokirlo, Tim devas fuĝi. — La elfo residiĝis en la

selon kaj forimpetis en mallumon kune kun la aro de fiŝetoj. Novan fulmon akompanis fora obtuza ektondro, kaj nekomprenebla, preskaŭ neeltenebla timego plenigis la tutan korpon de Tim. Li ekkuris, apenaŭ distingante subpiede palan lumon de la Vojo, la vento flugis post li kaj pelis nigrajn ŝaŭmajn ondojn, kaj tie, supre portis ĉiam pli proksime al la Vojo ekflamantajn per elektra lumo ondojn. Nekutima por longa kuro, Tim baldaŭ perdis la spiron, en la maldekstra flanko io abomene pikis. Restis nur la sola: halti, rekapti spiron, kvankam perdi tempon.

Kia ajn saĝega, kia ajn forta vi estu, sed ekzistas unu timo, obtuza neklarigebla timo pri nesciata io, la timo el noktaj inkubsonĝoj. Kaj ĉiu estas senforta antaŭ ĝi. Kaj neniu povas defendi, neniu povas forpeli ĝin. Tiel, antaŭlonge, en la fora infaneco, la patrino sidis surrande de la lito de Tim, kantis lulkanton, penante savi la filon de la nokta Koŝmaro. Sed tiu ne deziris foriri, sidis en la angulo kaj montris siajn nigrajn dentojn, ne lasante sur sojlon eĉ unu helan penson. Tiam Tim unuafoje komprenis, ke envere li estas sola, kaj ĉiam li estos sola, kaj ĉiam surfunde de lia animo en angulo sidos Koŝmaro kaj montros siajn nigrajn dentojn.

Nova ektondro skuis la teron. La Vojo subpiede ektremis, malhelaj onderoj jam atingadis Timon. Sed multe pli malvarma kaj malica ol tiuj onderoj estis terura glaciiganta la animon penso: haltinte lastafoje, li metis la kandelon sur la Vojon. Kaj forgesis ĝin tie.

Koŝmaro en profundo de lia animo frotis la malvarmajn piedetojn kaj tuŝis per ili la kunpremiĝintan koron de Tim. Tim denove ekkuris, kolektinte la lastajn fortojn. Antaŭ la nebuliĝanta pro laco rigardo aperis varma, belega, la plej bona en la mondo fajreto, fajreto de la fora lumturo. "Dio mia, mi la unuan fojon en la vivo komprenis, kio estas lumturo", — Tim ridetis kaj kun la lasta fortostreĉo larĝe malfermis la okulojn. La rufa lumo fluis internen, la glitaj piedetoj de Koŝmaro senhelpe malstreĉiĝis, ĝi ja ĉiam sciis, ke ĝi devas timi lumturojn. La koro varmiĝis, sed la fortoj perfidis. Tim jam perdis la konscion, kiam la malhelaj ondoj ŝiris lin de la Vojo kaj forportis en la maron.

***

"Nur ne esti fantomo de la Vojo", — tio estis la unua penso, kun kiu vekiĝis Tim. La ĉirkaŭa nokto estis varma, velura, en la ĉielo tute hejmece briletis la steloj, ie

deflanke fluis mola rufa lumo, la lumo de viva, tera fajro, la plej varma en la mondo. "Tamen nur ne esti fantomo de la Vojo…" Tim leviĝetis, pririgardis sian korpon. La korpo, kiel lia korpo, lia pantalono, ankoraŭ ies fremda svetero, sed ĉio viva, tute ne travidebla. Tim leviĝis, la korpo agrable ekdoloris, post longa kurado malstreĉiĝis la muskoloj. Li staris sur la luma makulo, sur la Vojo laŭ la maro. Antaŭe videblis bronza, punta, laŭaspekte antikva lanterno, post ĝiaj iom fulgiĝintaj vitroj brulis kandelo. Ĝuste al ĝi apartenis tiu mirakla rufa lumo. Ĉe la lanterno sidis virino ĉirkaŭ kvardekjara, minca, kvazaŭ knabino, pala, laca. Kun grandaj, preskaŭ lumantaj okuloj. Sur la kolo estis simpla silka tuketo kun desegnitaj edelvejsoj. Multaj virinoj en la urbo de Tim portis tiajn tuketojn. Tuj kiam ŝi ekvidis Timon, sur ŝiaj lipoj aperis rideto — tre bonkora, sed laca.

— Ĉu vi vekiĝis, karulĉjo? Preskaŭ diurnon dormis… Ĉu vi varmas, komfortas en svetero? Tage amiĉjo via alkuris, jen tion alportis. — Kaj ŝi etendis al Tim la kandelon, lian kandelon, la kandelon de la ŝipo kun oraj veloj. Tim kroĉiĝis al la kandelo per ambaŭ manoj, kaj ne havante fortojn elpremi el si eĉ unu vorton, malleviĝis, preskaŭ falis, apoginte la dorson je

lanterno. Ĉio travivita lastanokte superis lin, kaj ĉirkaŭ duonhoron li ploris, ploregis, ferminte la vizaĝon per la manoj. La virino tuttempe sidis apude, etendante al li jen la naztukon, jen la pokalon kun akvo, jen penante kovri lin per io ankoraŭ, same mola kaj varma. Ŝi tuttempe paroladis, komence ordinarajn sensencajn konsolojn, poste, kiam Tim iom trankviliĝis, ekrakontis:

— Amiĉjo via, bona tia, bela knabo, kun okulvitroj, nur nervoza, delikata, se vi ankoraŭ revidos lin, zorgu pri li, ne lasu. Li venis tuj, post kiam la tempesto trankviliĝis… Do vi ne ploru plu, trinku akvon… Jen do li venis, tute malseka, la kandelon al mi donis. "Ĝi, li diris, estas de tiu junulo, kiu dormas, transdonu al li kaj diru, ke mi lin pro tio ne malestimas, nur ne komprenas, kaj ĉio". Bona junulo.

— Ne kiel mi — malfortulo! — Tralarme grumblis Tim.

— Nu kial do vi tiel? — La voĉo de la virino kaj ŝia tono preskaŭ ne ŝanĝiĝis, ŝi parolis mallaŭte, trankvilige, karese, kvazaŭ Tim estus infano. — Mi ankaŭ nun vidas, ke vi estas tre forta, simple ankaŭ la forto estas por ĉiu sia propra. Do jen, mi donis al tiu junulo ion varman, teon verŝis, kaj li eksidis kaj

ekrakontis al mi. Kaj pri sia vivo en la universitato. Li tie estas la plej bona studento! Kaj pri tio, kiel li la Vojon trovis, kaj kiel penadis ekkredi, ke ĝi ne ekzistas, sed ne sukcesis. Mi konsolis lin, kiel vin nun, kaj poste, kiam li estis foriranta, li diris: “Vi estas tro bonkora, tiel ne eblas, science pruvite”.

Tim deprenis, finfine, la manojn de la vizaĝo kaj levis la okulojn, la virino tremis, ŝiaj okuloj, grandaj kaj lacaj, brilis pro larmoj.

— Kial do vi? — Tim eĉ iom ektimis. — Ĉu pro tiu matematikisto? Ja ĉe li ajna aĵo estas “science pruvita”, kaj ke la Vojo ne ekzistas, sed ni ja sidas sur ĝi!

— Tamen ne, karulĉjo, en io li pravas. Vi dume kutimiĝu ĉi tie, kaj mi iros matenmanĝon prepari. Vi min ne atentu, simple nervoj maltrankvilas, — ŝi denove ridetis per la same elturmentita, sed bonkora rideto, leviĝis kaj iris ien en mallumon.

Tim ankoraŭ kelkajn minutojn sidis, sin apoginte al la lanterno. Koŝmaro, ŝajne, malaperis senspure, malaperis ankaŭ la firma sento de senfina soleco. Ja ekzistas tiaj homoj, kun kiuj estas varme, hele, kvazaŭ suneto lasis en ili sian lumon. Kiel bone, ke Tim renkontis tian virinon.

Poste li leviĝis kaj ĉirkaŭrigardis, sub la lanterno estis io simila al ĉambro, nur sen plafono kaj muroj — bunta tapiŝo, forno, sur kiu kontente fajfetis kupra teujo, ŝranko kun varmaj sveteroj, mola lito kaj buntaj helaj littolaĵoj. Tiaĵon sur la Vojo li renkontis ankoraŭ neniam, tiu neatendita hejmeca komforto ŝajnis mirakla kaj netera, kiel ankaŭ la zorgemo de tiu virino. "Se ŝi savis min de la tempesto, vestis min, regalis per teo, do, mi tion meritas, do, mi estas ne plena malfortulo. Se ŝi konservis por mi la kandelon, do en la kandelo estas nenio malbona… Sed, de alia flanko, ja ŝi regalis per teo ankaŭ la matematikiston, tiun stultulon, ĉe kiu ĉio estas science pruvita, kaj, verŝajne, multajn aliajn. Kaj kun ĉiuj ŝi estis same… bonkora… la sama… do por ŝi ne estas diferenco. Kaj ne min ŝi komprenas kaj kompatas… Sed mi ja estas tamen sola". Malgraŭ la varma svetero, Tim denove frostis.

— Hej, pri kio vi enpensiĝis? — demandis sonora knabina voĉo. Tim rerigardis, ĝuste tiel: knabino kun du harplektaĵetoj, en ĉemizo kaj ŝirita ĵinso, ridinda. Tamen ŝi sidis en kaĝo, la kaĝo pendis surĉene nemalproksime de la lanterno. Suicidulo, ankoraŭ unu fantomo de la Vojo.

— Vi estas beleta, simpatia. Mian amikon similas, — ŝi ekridis, nervoze kaj malagrable.

— Kion vi volas?

— Nu… Mi por li kantojn verkis kaj gitarludis vespere, sed li min lasis. Mi ĉi tien alkuris larmokovrita. Tiu, Sanktulino, ĉiam kompatis min, trankviligis, diradis, ke li ne meritis min. Kaj poste ankaŭ li estis alportita ĉi tien. Ŝi ne sciis, ke tiu estas li, aŭskultis lin. Sed mi subaŭskultis. Eĉ ne unu bonan vorton pri mi li diris. Nu, kaj mi saltis en la maron. Por kio mi bezonu la Vojon, se la homo, kun kiu mi iris laŭ ĝi, eĉ ne konas min, mi jam ne petas, ke li komprenu!

— Sed ĉu pri la virino, kiel vi ŝin nomis, “Sanktulino”, vi ne pensis?

— Ŝi ja vere estas sanktulino, ŝi ĉion komprenos, ne maltrankvilu pri ŝi, — tiuj vortoj terure ne plaĉis al Tim, ne endis tiel paroli. Sed Tim staris sur la Vojo laŭ la maro, kie nenio okazadas simple tiel. Kun malagrabla klareco Tim rememoris, kiel li mem parolis kaj diris, ekzemple, pri Mari: “Ŝi estas bonkora, ŝi pardonos, se mi kaŭzos por ŝi doloron. Do, eblas”.

— Ĉu vi denove enpensiĝis? Ne, vi tute ne similas al li. Li estis gaja, babilema. Kiel ja mi amas lin! — Ne,

tio jam iĝis netolerebla. “Oni tiel ne diras pri la homoj, kiujn amas, ĉu? Sed kiel oni diras? Do neniel, neniu iun amas! Ĉio ĉi estas deliraĵo, ĉiu homo estas soleca, tute sola”.

— Mia kandeleto estingiĝis, mi frostas. — Tim morne levis la kapon, rigardis al la ridetanta knabino kaj prenis el ŝia travidebla mano kandelon. Ankoraŭ unu animon ligi kun la sia. Subite Tim dolore ekkriis kaj ĵetis la kandelon reen en la kaĝon. La brusto reeĥis per malica, netolerebla doloro. La knabino stride ekridis.

— Mi scias-scias, vi provas fordoni peceton de via animo la duan fojon. Sciu, amiĉjo, nur la unuan fojon estas nedolore ekami, ĝis vi ne scias disiĝon kaj perfidon.

— Mi ne havas kialon ami vin, ne estas pro kio! — kolere rebatis Tim.

***

— Ŝako, — la vica fantomo, maljuniĝanta viro kun monotona voĉo, sidis apud la forno kaj ŝakludis kun si mem.

— Ĉu ne estas enue tiel? — Tim venis al li, paroli kun la knabino el la kaĝo li ne plu volis.

— Mato. Enue, nigraj figuroj, blankaj figuroj, nigra, blanka, nigra, blanka…

— Sed ĉu vi ne havas kun kiu ludi?

— Mi ne ŝatas ludi kun aliaj. Frue aŭ malfrue vi malgajnos, sed ĉe mi mem mi ĉiam gajnas.

— Jes, tion ne eblas refuti. Sed vi ja ankaŭ malgajnas al vi ĉiam, — Tim ekde infaneco ŝatis diskuti.

— Gajno kontraŭ malgajno — rezultiĝas nula partio. Komprenu, knabo, dum la homo solas, dum li ludas kun si mem, li ne povas malgajni.

— Tion mi jam komprenis, — respondis Tim. — Sed kial vi ne irus ien?

— Por kio? Sanktulino jam kuiras por mi matenmanĝon. Se ankoraŭ io estos bezonata, ŝi ankaŭ faros.

Tim intencis koleriĝi je tiuj vortoj, sed kaptis sin ĉe la penso, ke ankaŭ li atendas matenmanĝon kaj okupiĝas pri senenhava babilado. La humoro impete malboniĝis.

— Ne malhelpu al li ludi, venu ĉi tien! — En la malhela — estis ankoraŭ nokto — maro, suprenlevante malvarmajn akverojn, mallerte naĝadis junulo en marista

ĉemizo kaj kun multtagaj stoplaj haroj sur krudhaŭtaj vangoj. Timon maltrankviligis tio, ke la fantomo ne eliris el akvo, Tim penadis kapti lian rigardon. Jes, estas tiel, li havas malplenajn okulojn. La fantomo, kiu cedis, samkiel blankaj ombroj komence de la Vojo, samkiel Mari.

— Kion vi ĉi tie faras? Kial tiom malproksime de komenco de la Vojo?

— Mi simple iris, kiel ĉiuj. Min turmentis terura soifo kaj varmego. Sanktulino donis al mi malvarman bieron, kaj donadis ĉiutage, do mi decidis resti ĉi tie. Poste la biero finiĝis, kaj mi decidis, kiucele mi bezonas tian Vojon, kaj jen mi estas ĉi tie. Ĉi tie estas bonege, plonĝu ĉi tien! Aŭ vi malfortas?

Tim rememoris blankan rondodancon, malvarmajn lumojn, palajn marvirinetojn — kaj teruriĝinte formoviĝis.

— Kio okazis, karulĉjo? — La agrabla trankviliga voĉo de Sanktulino eksonis post la dorso. Ŝi staris antaŭ la kaĝo, metinte sur la Vojon pleton kun matenmanĝo.

— Knabinjo mia, via kandeleto estingiĝis, donu ĝin al mi.

Ŝi portis la kandelon al sia brusto, kaj ŝia tuta minca korpo ektremis pro netolerebla doloro. Jen pro kio estas ŝia paleco kaj nervozeco.

— Ankaŭ la mia estingiĝis, — la viro leviĝis de post la ŝaka tablo, io malagrabla, avida glitis en lia vizaĝo.

— Por mi lumon, kaj bieron, ĉu vi aŭdas? — la fantomo kun krudhaŭta vizaĝo alnaĝis preskaŭ al la Vojo mem.

— Kaj al mi!

— Lumon!

— Varmon!

— Donu al mi!

De ĉiuj flankoj, de la nokta malhelo, ĉirkaŭanta la lanternon, eliradis duonfantomoj kun ankoraŭ vivaj, malicaj, avidaj rigardoj. La nokta maro ekbrilis deinterne per pale-blua lumo, la blankaj, preskaŭ mortaj ombroj kun bluaj lanternoj leviĝadis el-sub akvo, alnaĝadis al la Vojo mem.

— Amon!

— Lumon!

— Varmon!

— Jes, jes, povraj vi miaj, povraj, tuj, — Sanktulino prenadis kandelon post kandelo, tuta ŝi tremis, ĉiufoje

doloro pli kaj pli forte skuigis ŝian korpon. — Ne timu, por ĉiu sufiĉos mia amo, por ĉiu sufiĉos mia varmo.

La stuporo pasis, Tim ekkuregis, nur li ne haltu, nur ne rerigardu, ne vidu, kiel eta, malforta lanterno provas ĉirkaŭi per sia kara, febla varma lumo la tutan tiun obskuran, blindan, senkompatan en sia nescio mondon!

— Neniun el ili vi savis, Sanktulino, — krias Tim en ĉirkaŭintan lin netravideblan mallumon. — Kiel ajn vi ĉirkaŭu ilin per via lumo, la lumo estas tro travidebla por vidi ĝin. Ili iĝis nur pli malfortaj pro via lumo. Ili vin ne komprenis, vi ilin ne savis. Neniu iun kaj iam komprenos kaj savos. Ni ĉiuj estas solaj, ĉiuj!

Antaŭe, tute apude, sur la lumanta strio de la Vojo, montrante nigrajn akrajn dentojn, sidis Koŝmaro. Ĝi etendiĝis, rektigis la glitajn piedojn kaj kun tranĉanta aŭdon fajfo blovis en la flankon de Tim. Pro tiu elspiro la dorson de Tim tuŝis frido. Koŝmaro montris la dentojn kaj siblis, festante la venkon, ĉirkaŭe estis mallume, ĉe horizonto tremis fulmrebriloj, la Vojo estis mallarĝa, efemera strieto de lumo, kaj neniu iun savos.

Kaj subite Tim kaptis sin ĉe la penso, ke por li estas tutegale. Antaŭ li sidis ne la nesciata teruro, sed la same soleca estaĵo, kiu pie deziris lian, de Tim,

animon. Ĉiu homo, kiu iras laŭ la Vojo, same bezonas ĝin, la animon, nur tiun bezonon oni nomas amo. Jen la tuta diferenco.

— Nu kial vi rikanas? Ĉu vi memoras, kiel vi unuafoje aperis, kiel vi sidis en la angulo de la infanĉambro? Mi tiam unuafoje ektimis, ke mi estas sola. Mi ĉiam atendis, la tutan vivon, ke oni min kaŝos de vi, en varma brakumo, en rufa lumo, sed vi daŭre sidis en angulo, ĉu vi memoras?

Koŝmaro denove provis minace sibli, sed ĉi-foje rezultiĝis mizere.

— Kaj nun mi komprenis, ke tiu timo estas sola vero en la mondo. Mi estas sola, kaj neniu sukcesos plenigi mian animon per rufa lumo de mara lumturo. Tiu lumo estas nur momenta ĝojo, post tago ĝi estingiĝas — kaj fino. Kaj vi mian animon ne forprenos, kiel ajn vi volus. Ankaŭ vi estas por ĉiam sola. Kaj neniu al vi helpos. Kaj nun iru for.

Tim ankoraŭ nelonge staris, rigardante, kiel pleniĝas per malpleno la malicaj ruĝaj okuloj, kiel la lumo de la Vojo solviĝas sub la glitaj piedoj, kiel malleviĝas en la ondojn, iĝas travidebla kaj tute ne timiga la lasta en la mondo estaĵo, pri kiu Tim pensis, ke ĝi restos apud li por

ĉiam. Tim sentis sin kiel neniam forta. Nun li atingos finon de la vojo, tutsola, nepre atingos.

***

La Vojo gvidis laŭlonge de la bordo. Malsupre, tra la helblua, sparkanta subsune onda surfaco, flavis sablo, ankaŭ la bordo je kelkaj metroj apude, estis sabla, flava, ĝojplena. Kaj la suno ludis ĝoje. Tim sentis sin preskaŭ same, kiel en la unua mateno, mateno kun oraj veloj. Tamen nun ne necesis kuri, ne estis maltrankvilo, ne estis tiu sentima feliĉo, nur la trankvilo, absoluta certeco pri si mem, venkinta Koŝmaron, akceptinta solecon. Ĝisgenue en akvo ĉe la Vojo staris enpensiĝinta junulo en blanka punta ĉemizo. Antaŭ ol proksimiĝi, Tim kaptis lian rigardon, kunpuŝiĝi kun fantomoj kun malplenaj okuloj li ne volis. Sed la okuloj de la junulo estis vivaj, nur iom pensemaj. En la manoj li tenis malsekan sablon, miksitan kun diverskoloraj konkoj.

— Ĉu ankaŭ vi estas artisto? — Li kurioze rigardis al Tim.

— Ne, kial vi tion decidis?

— Vidu, ekzistas homoj, kiuj simple vivas, ne pensas, ne kredas, konsideras la okazantan ĉirkaŭ si devio de realeco. Ili ne trairas la unuan pordon. La aliaj kredas: je amo, amikeco, interhelpo, scipovo fari bonon, ebleco ricevi bonon… Ili restas tie, kun Sanktulino, kiel fantomoj. Kaj vi, do, havas ankoraŭ ion?

— Kaj vi?

— Mi estas artisto. Mi decidis, ke se en la mondo io ne ekzistas, mi povas krei ĝin. Ĉu vi vidas la kastelon el sablo sur la bordo?

La kastelo efektive estis belega, je du homaltoj, kun dek du turetoj, ĉiun el kiuj kronis tegmento, kiel per tegolo kovrita per ruĝaj konkoj.

— Kaj efektive, tre bela, ankaŭ mi iam volis iĝi artisto.

— Ĝi estas nur kastelo. Foje mi skulptis el sablo junulinon, kun kiu mi neniam estus soleca. Mi forpermesis ŝin. Mi donis al ŝi kandelon de mia animo, por ŝi povu vivi, kaj forpermesis. Ja la homo devas iom resti sola, por kompreni, ke li volas esti kun iu. Ŝi ne revenis. Do je kio kredas vi?

— Je tio, ke la Vojo havas finon, kaj je tio, ke ĝi atendas min, nur min.

— Li kaj Inga.

La artisto ridetis.

— Ĉu vi konas ŝin?

— Ho, jes. Ŝi desegnis tiun ĉi kastelon, kaj mi ĝin skulptis, ni longe ĝuis sunsubiron, kaj poste dancis rokenrolon sub pluvo. Du stultuloj, sciantaj, ke neniu iam iun komprenos, sed tamen kuraĝintaj fordoni al iu siajn animojn senreste. Mi kaj ŝi povus esti feliĉaj kune, sed ŝi ĉiam rigardis malantaŭen, atendis, ke vi venos. Sed mi rigardis antaŭen kaj atendis, ke revenos mia Lejla.

— Sed nek mi, nek Lejla tion rimarkis, kiel oni ne rimarkas lanternan lumon, kiel oni ne rimarkas la doloron de Sanktulino.

— Sed mi konstruis por Lejla kastelon, kaj Inga kreis por vi ŝipon kun oraj veloj. Mi kaj ŝi estas artistoj, ni havas aliajn kriteriojn, Tim.

— Jes, vi povas krei tion, kio ne ekzistas. Sed mi atingos la limon de tio, kio ekzistas, ĝis mondorando, descendos post tiun randon.

— Ĉiu homo estas artisto, kreanta tion, kio ne ekzistas, Tim. Tial la mondo ne havas randon.

— Mi iru, — Tim ne ŝatis tiajn parolojn. Kaj tiajn malfortulojn, ili ne pli bonas ol suiciduloj. Kaj se Inga ligiĝis kun tiaulo, do ne multon ŝi valoras.

— Iru. Saluton al Inga. Kaj… se vi hazarde renkontos Lejlan, diru, ke mi ĉiam atendos ŝin.

***

La suno gaje ludis sur la ondoj, tra la travideblaj ondoj flavis la fundo. Tim paŝis antaŭen plena de forta, ĝoja certeco pri sia praveco. Eblas eĉ renkonti neniun plu, li ĉion komprenis kaj ĉion scias. Eble nur du knabinojn trovi, pro scivolemo. Unun el ili li jam vidis, ŝi staris sur la Vojo, kruciginte la manojn surbruste. Sunbruniĝinta haŭto, helaj haroj, flava robo, nenature grandaj brunaj okuloj. Knabino, farita el sablo de ĉiuj specoj kaj kolornuancoj.

— Ĉu Lejla?

Ŝi kapjesis.

— Tie oni vin tre atendas.

— Mi ne iros tien, — ŝi tremis kaj kurbigis la ŝultrojn.

Tim demetis la sveteron de Sanktulino kaj etendis al la knabino.

— Dankon, sed mi ne bezonas. Mi ne frostas, mi simple mortas.

— Kion do vi diras, ĉu ankaŭ vi ne kredas la Vojon?

— Mi kredas, simple la kreaĵo ne povas longe vivi sen la artisto, la kreaĵo bezonas multe pli da lumo. Jen mi tenas la kandelon de lia vivo, sed ĝi ekestingiĝas…

— Revenu al li, estas nemalproksime, ĉu vi volas, ke mi akompanu?

— Mi ne revenos. Li estas mia Dio, ĉar li kreis min. Kia ajn belega mi estu, kion ajn mi faru, mi por ĉiam restos nur lia kreaĵo, nur lia parto. Li neniam estos feliĉa kun mi. Mi estos kun li, sed li sentos nur solecon.

— Kiel ĉiam.

— Mi ne scias, kiel ĉiam.

Kaj ŝi denove kunpremiĝis, kvazaŭ pro malvarmo.

Tiam Tim prenis ŝian kandelon. Furioza doloro ŝiris lian korpon. La kandelo ekflamis. "Lastafoje, — pensis Tim, — lasta tributo por tiuj, kiuj kredas je io krom soleco".

La bordo jam malproksimis, kaj la maro iĝis malhelblua. Antaŭe, sur la Vojo, videblis io malhela. Veninte pli proksimen, Tim komprenis, ke tio estas la dua pordo. "Fermu la okulojn, rememoru la Vojon kaj diru, kion vi komprenis pri ĝi, trairinte ĝian duan parton".

— Ĉiu homo estas absolute soleca. Neniu iun kaj iam komprenos. Neniu iun kaj iam helpos. Ĉu vi fordonos al iu la tutan animon aŭ dividos ĝin je mil partoj, por la tuta vivo vi restos sola. Eĉ se tiu, kiun vi amas, estas elpensita de vi, li tutegale ne komprenos vin. Tio estas por la tuta vivo. Ĝuste tio estas la libero. Ĝuste tio estas la feliĉo.

La pordo knaretis kaj malrapide, malgaje malfermiĝis.



# ĈAPITRO 3

Inga staris, fermetinte la okulojn kaj submetinte la vizaĝon, jam sen tio ventharditan, al la helaj sunaj radioj. La vento flirtigis la malhelrufajn krispajn harojn kaj leĝeran grizan robon. Tim rekonis ŝin ankoraŭ demalproksime, kaj apenaŭ ne ekkredis, ke post la vivo estis ankoraŭ unu vivo: tiel bone li konis ŝian mincan figureton, infanan vizaĝon, la kutimon teni la kapon iom flanke kaj kaŝi la poleksojn en poŝojn de la robo. Li mem ne sukcesis kompreni, kiel ĉiuj ĉi pensoj venis lian kapon, ja li imagis ŝin tute alia, adolta, forta, enpensiĝema. Sed antaŭ li estis ridinda rufa knabinjo, kortuŝa knabinjo, kiun li jam longe-delonge konis.

Dum Tim pelis de si ĉiujn ĉi pensojn, ŝajnintajn al li tute fremdaj, Inga, ŝirminte la okulojn per sunbruniĝinta maneto, turnis la kapon kaj kun ĝoja ekkrio sin ĵetis al

la kolo de Tim. Tim ne moviĝis, ne por tio li ĉi tien iris, li bezonas la finon de la Vojo kaj ke neniu lin haltigu dumire. Sed Inga faris paŝon malantaŭen, tenante Timon je la ŝultroj, kaj longe, ridetante, rigardis rekte en liajn okulojn. La suno ludis en ŝiaj bukloj, al Tim subite ekŝajnis, ke ĝi ludis iel speciale, kvazaŭ la suno amis Ingan, ŝatis ludi per siaj mincaj radioj en ŝiaj haroj.

— Vi estas bela, Tim.

— Sed ĉu vi ne sciis, kia mi estas, sendante al mi la ŝipeton kun via animo?

— Mi sciis, certe, stulteta vi, mi simple ĝojas. Kiel mi ne sciu, ja mi ĉiutage vidas vin jam dum multaj tagoj per la plej atenta en la mondo rigardo, la rigardo de mia animo. Sed tiam mi ne povis jen tiel tuŝi vin, — kaj ŝi glatumis la ŝultron de Tim.

— Do, vi scias ankaŭ tion, ke mi jam delonge iras ne al vi.

Tim subite ekvolis esti senkoncerna kaj severa. Inga estis tro fidema, tro aminda kaj juna, por ke li iru laŭ la Vojo kune kun ŝi, sciante, ke en la mondo estas nenio, krom soleco. Tio estus trompo, tio estus malnobla.

— Kiel do vi povus iri al mi, stultuleto? Vi ja unuafoje en la vivo min vidas, — Inga ridetis simple,

infanece kaj, preninte Timon je la mano, malrapide ekiris antaŭen.

Ankaŭ la vento amis ŝin, glatumis ŝiajn harojn, levadis kaj mallevadis leĝerajn robofaldojn, kaj la Vojo brilis pli hele, kvazaŭ ĝi estis fandita el hela oro, sed ne glitis surakve kiel lumreflektaĵo. Enaere flugetis rufa papilio, gasto de la ankoraŭ proksima bordo. Inga ridetis kaj suprenetendis la malfermitan polmon. La papilio malleviĝis sur ĝin kaj kunfaldis la buntajn flugilojn.

***

— Sed vi ja trairis tiun ĉi Vojon, same kiel mi. Ĉu vi nenion komprenis, Inga?

— Ĉu pri tio, ke ĉiu el ni estas soleca? Mi komprenis.

— Por kio mi bezonatas por vi, Inga?

La vizaĝo de la junulino pormomente iĝis serioza, eĉ adolta.

— Survoje estas multo, pri kio vi ne scias. Vi ne observis, kien forflugis la drako, sed li direktis sin al Avalono, rifuĝejo de la plej noblaj en la mondo animoj

kaj feaj estaĵoj. Vi iris apud Avalono, eterne verda kaj enigma, ĝi rigardis al vi el nebulo, kaj flugilhavaj elfoj ludis fifrete sian ĉarmigan melodion, sed vi ĝin ne ekaŭdis.

Tim rigardis al Inga sendeturne, konsternita de tio, kiel povas ŝanĝiĝi la homa vizaĝo. Nun ĝi estis tute adolta, eĉ iom severa. Ŝi eksimilis sorĉistinon el antikvaj fabeloj, ĝi lumis elintere, kaj tiu lumo timigis kaj prisorĉis Timon.

— Vi kutimiĝis vidi nur fantomojn kaj vivantojn, lumon kaj mallumon, "jes"-on kaj "ne"-on…

— Duonnuancoj estas malfortaj, ne pli, mi opinias, ke ĉio devas esti ĝisfina aŭ entute ne esti.

— Mi ne pri tio, nek vi, nek mi iam povos akcepti duonnuancojn. Simple, krom lumo kaj mallumo, krom vivo kaj morto ekzistas ankoraŭ unu forto, egala al ili.

— Kiu forto ĝi estas?

— Fabelo, — kaj sekundon post tiuj vortoj Inga denove iĝis si mem, ridetis kaj, lasinte la manon de Tim, ekkuregis antaŭen, poste haltis kaj atendis lin.

— Vi mokas min, ĉu, sorĉistino? — Tim unuafoje dum tiu tago ridetis.

— Ne, simple mi ŝatas kuradi kaj terure ne ŝatas longe resti serioza, mi ja estas malgranda, kvankam sorĉistino, al mi mankas fortoj.

— Vi ja ne respondis, Inga. Kiucele vi min bezonas?

— La vivo havas tri cirklojn. La dua estas tiu, kie vivas ĉiuj ni. Naskiĝas, mortas, denove naskiĝas. Ĝis ni trovas tion, kiucele ni venis, kaj tiun, kies animo kuniĝos kun la nia en unu stelon. Poste ni trafas en la trian cirklon, paradizon, sed tien, tamen, ankoraŭ fruas. Ekzistas ankoraŭ la unua cirklo. Abismo. Tie loĝas Dio kaj per betula vergo pelas sur la teron la animojn kaj ĉion, kio estas destinita. Reveni tien povas nur du animoj. Por iĝi unu stelo.

— Sed por kio vi bezonas tiun stelon?

— Por kompreni la lastan en la vivo, kion mi ne komprenas. Kaj por la aliaj kompenu.

— Do kio ĝi estas? Ĉu la soleco ne estas la lasta?

— Ne, mi volas kompreni ĉion kaj nenion.

Tim ne komprenis, sed ne plu demandadis, nun li mem prenis la manon de Inga. Kaj nun al li ekŝajnis, ke se li povus forgesi pri ĉio, kion li komprenis nun, li travivus apud Inga longan kaj bonan vivon, tiom bonan, kiom bona povas esti la vivo de tiu, kiu neniam konis

la Vojon laŭ la maro. Li haltis kaj haltigis ŝin, li longe rigardis al ŝi, direktinte la rigardon al la peceto de la lunŝtono, pendanta sur la kolo. Metiista ŝtono, pala blank-blueta kristalo, per ia mirakla maniero koloriganta la trairantan tra ĝi lumon je la rozkolora. Ankaŭ ĝin li ĉiam konis kaj amis. Tim venis al Inga kaj dronis vizaĝe en ŝia rufa hararo.

— Bedaŭrinde, ke mi venis tiom malfrue. — Diris li. — Ankoraŭ iom pli frue mi povus trompi min.

— Ankaŭ nun vi tion faras. Vi timas diri "jes", por ne ŝanceli vian kredon je soleco. Vi jam ne diras "ne". Kio estas la nuancoj, kiujn vi ne komprenas?

Li levis la kapon, ŝi rigardis al li tute serioze, kaj la ŝtono ĵetis tenere-rozan lumon al ŝia haŭto. Tim ankoraŭ kelkajn sekundojn hezitis. Poste al li ekŝajnis, ke la aero mem ĉirkaŭ ŝia figuro estis penetrita de lumo kaj varmo.

— La mondo mem amas vin, Inga. La mondo mem ne pardonos min.

Sed, dirante tiujn vortojn, Tim jam estis malliganta la zonon de la griza robo.

— Inga, mi komprenas, kion vi konsideras, parolante pri fabelo.

Kaj ili malleviĝis sur la Vojon. Iom da tempo Tim ankoraŭ vidis kaj aŭdis la mondon, kaj poste ĉio kunfandiĝis en unu helan sunan nebulon.

***

Tim kuŝis sur la Vojo, preminte Ingan al si, kaj rigardis, kiel flaviĝas kaj malleviĝas en molan horizonton la lanugeca suno. Fabelo estas, kiam vi kredas ion, sciante, ke ĝi ne ekzistas kaj ne povas ekzisti. Tim ĉiam opiniis tion malfortaĵo, sed nun li komprenis, ke li eraris.

— Vi ne kredas je soleco, ĉu, Inga?

— Kial do, mi kredas. Foje vi komprenas, ke neniu iam komprenos vin kaj helpos vin. Ĝuste akcepto de tio estas libero, pri kiu oni tiom multe parolas.

— Do kial vi atendis min?

— Ĉar kaj la soleco, kaj la libero apartenas al tempo. Vidu, subite, irante laŭ la Vojo, vi ekvolos, ke mi ĉiam estu kun vi, komprenu vin, protektu de soleco. Sed iam tio finiĝos. Ni kverelos, disiĝos, ĉesos kompreni unu la alian.

— Jes, certe, ĝuste tial mi petas vin, ne provu reteni min.

— Mi promesas. Jen do, jen do, tiel okazos pro tio, ke la tempo estas tempo, en la tempo ĉio finiĝas. Sed ekzistas ankoraŭ ankaŭ eterneco, kie la frazo “mi amos vin ĉiam” por ĉiam restos vero. Ĉar ĝi estis vero en tiu sekundo, kiam ĝi estis eldirita.

— Aŭdu, sed ja envere, ajna vero ekzistas nur tiusekunde, kiam ĝi estas eldirita.

— Sed en tiu sekundo ĝi por ĉiam restos vero. Komprenu, Tim, se el la tuta animo forlasi iun momenton, ne provante ligi ĝin al la pasinto, ne serĉante por ĝi estonton, do ekde nun kaj por ĉiam ĝi apartenos al eterneco. Kaj forirante de la tero, ĝi desegnos sian vojeton sur la maro.

La suno subiris, lasinte rozkoloran strieton sur la horizonto. “Ĝuste tia momento estas fabelo, — pensis Tim. — Mi foriros, sed nun ĝi daŭras, kaj al mi estas bone. Kaj, povas esti, akcepti tiun momenton inter la soleco, kiu inundas la tutan mondon, estas la plej komplika, kio ekzistas en la mondo, sed ĝi tion valoras”. Kaj li pli forte brakumis Ingan. Inga estis ekdormanta.

***

Pluvetnebulo kovris la ĉielon kaj la maron, la gutoj estis nerimarkeblaj, kiel vaporo, sed baldaŭ la vestoj humidiĝis, kaj iĝis malvarme. Oni volis bordon, lignofajron, iom da varma rufa lumo. Kaj tiam Tim rigardis al Inga, al ŝia fajra hararo, priŝutita per etaj brilantaj gutetoj. Ekde la hieraŭa vespero li rememoris nek pri la fino de la Vojo, nek pri la soleco, li simple ie profunde de la animo memoris, ke tiu ĉi Vojo, pluvo, lia Inga estas nur momento, kiun li tuj-tuj devos forlasi, forlasi en eternecon. Sed la sento de tio, ke tiu momento dume daŭras, plenigis Timon per la forgesita infana paco, ĝojo de la hodiaŭa tago. Al li plaĉis spiri, plaĉis iri, plaĉis la pluvo, simila al vaporo, kaj la maro, droninta en tiu pluvo. La mondo subite perdis siajn sekretojn kaj sencojn, ĝi iĝis simpla, malgranda, komforta. Tim, Inga kaj pluvo, plu nenio estis en la mondo, kaj nenion pli li bezonis. Tim netolereble volis rakonti al ŝi pri tio, sed nun ne tempis. Inga tuta kvazaŭ lumis, la vaste malfermitaj okuloj rigardis al la ĉielo kun tia espero, ke mem la ĉielo heliĝis sub ilia rigardo, kaj la gutetoj sur la haroj rebrilis, kvazaŭ en ĉiu dormetis eta ĉielarko.

Povas esti, same aspektos li, Tim, kiam li atingos finon de la Vojo, povas esti, ĉiu homo, kies plej sekreta revo jen-jen plenumiĝos, aspektas same. Povas esti. Sed tamen tiu mondo amas Ingan, tiel simple, tiel sincere, la pluvnebulo disiĝas antaŭ ŝi, rebrilas la blanke-blueta ŝtoneto sur la kolo, respegulante molan rozan lumon al la brusto, al la pensema vizaĝo.

— Jen, — Inga prenas Timon je la mano kaj montras antaŭen. Iom flanke de la Vojo pendas nubo de blanka, preskaŭ netravidebla nebulo. — Tie, en la nebulo, estas tero, kaj en ĝi — Abismo. Ja vi iros kun mi, ĉu vere, Tim?

— Inga… Vi povas konsideri min timulo, sed ĉu vi certas, ke ni povas tiel, simple foriri de la Vojo? Ke la Vojo ne konsideros tion fuĝo, ke ni morgaŭ ne pendos ĉi tie en kaĝoj kaj petados la preterpasantojn doni al ni iom da lumo?

— Stulta, — Inga parolis ne returniĝante, ensorĉite rigardante al la nebula nubo. — Vi tiom delonge iras, sed tamen ne komprenis la ĉefan. La Vojo ne estas rekta linio, desegnita sur la maro. La Vojo estas spuro de la ŝipo de dioj. La Vojo estas viva, kaj se en la mondo estas la loko, kiun vi devas viziti, la afero, kiun vi devas fari, la Vojo ne preteros ĝin.

Kaj efektive la flaveta diafana lumo de la Vojo moviĝetis antaŭen kaj dividiĝis je du partoj: granda vojo kaj apenaŭ videbla mallarĝa padeto — vojo al enigma insulo. La koro de Tim dolore pikis:

— Sed ja tiel okazos, Inga. La vojo disduiĝis, vi iros viaflanken, serĉi fabelon, sed mi iros miadirekten, por atingi la finon.

— Se tio estas via vero, Tim, do tiel okazos. Mia vero estas alia. Eble, mi sukcesos montri ĝin al vi. Hodiaŭ mi ekvidos la Abismon, kaj nokte okazos luna eklipso. Kaj poste, kiam la luno reviviĝos, mi iĝos pli forta, ja mi estas sorĉistino, la luno helpas al mi. Kaj tiam vi komprenos mian veron.

— Vi promesis ne reteni min.

— Pardonu, mi simple tre volas, ke vi tion komprenu.

Ili venis proksimen al la nebulo, kaj, paŝinte en ĝin, Tim apenaŭ ne perdis konsciencon.

Samtempe li eksentis milon da odoroj, ekaŭdis milon da sonoj, kaj ĉiu el ili elvokis en lia animo rememorojn. Kelkajn karajn kaj helajn, la aliajn hontindajn kaj malicajn. Estis ankaŭ tio, pri kio Tim ĝenerale ne volis rememori. Ili tiom multis, ke la menso malheliĝis kaj la

fortoj forlasis lin. Apogante sin je la ŝultro de Inga, li eliris el la nebulo.

— Ne timu, — Inga sidigis lin sur la teron, kaj li subite eksentis interne strangan, agrablan malplenon, ĉiuj rememoroj malaperis, bildoj estingiĝis, sonoj silentiĝis. — Tio estis nebulo de la memoro. Nun vi memoros nur tion, kion indas memori. Nur tion, kio efektive gravas.

Tim ĉirkaŭrigardis. Li sidis en densa herbaro, super li hele brilis la suno, reflektiĝante en roseroj, lumigante stretajn rojojn, kampojn el tenere-siringaj kampanuloj, arbustojn, sur kiuj grose maturiĝis rubusberoj. Kaj sur ĉio ĉi kuŝis ia jam tute netera paco.

— Ĉi tie eblas ripozi, sed nur iom. Vi povas ĝui ĉion, kio estas ĉi tie, sed kredi tion ne indas. — Inga sidiĝis apud Tim kaj etendis al li kelkajn sukoplenajn nigrajn berojn. Ŝian hararon jam ornamis la krono el kampanuloj, kaj al Tim pormomente ekŝajnis, ke la kampanuloj sonoras. — Vidu, ĉi tie vivas respegulaĵoj, respegulaĵoj de ĉiu el tri cirkloj. Tiu ĉi estas la lasta, tial ĉi tie estas tiel trankvile kaj silente. Sed tamen, tio ne estas paradizo, Tim, nur ĝia reflektaĵo. Kredu al ĝi — kaj vi estos fantomo de la Vojo, dancanta kun marvirinetoj.

— Tiam ni iru, aliokaze al mi ekplaĉos ĉi tie.

— Apenaŭ, — Inga ridetis. — Vi estas tro sentema kaj tre rapide rimarkus, ke envere ĉi tie estas mallume, ke post tiu ĉi valo komenciĝas mondorando kaj ĉiu ĝia rojeto estas nenio alia, sed la fendo, interne de kiu dormetas praa Malpleno.

Kaj kvazaŭ konfirmante la vortojn de Inga, la aero subite iĝis malagrable malvarma. Io ekblovis en la dorson de Tim, kaj lin kaptis glacia frido. Konata sento. Tim returnis la kapon. El-post la momente sekiĝinta kaj flaviĝinta arbusto, prilekante nigrajn dentojn, elrampadis Koŝmaro.

— Denove vi! De kie vi estas ĉi tie? Ja vi dronis, vi estas fantomo, vi ne ekzistas, — Tim penadis reteni malvarman tremon.

— Ni simple foriru de ĉi tie, Tim. Iu ajn nokta koŝmaro, iu ajn senkonscia timo estas parto de ĝuste tiu praa Malpleno, kiu spiras ĉi tie el ĉiu direkto. Ĝi estas timinda nur tiam, kiam ĝi dormas interne de vi. Nun ĝi estas ĉirkaŭe, sed nek en vi, nek en mi plu restis loko por ĝi.

Koŝmaro rampis ankoraŭ kelkajn metrojn, lasante post si bruligitan sekan herbaron, poste malleviĝis en la rojon kaj malaperis en ĝi.

La kampo subite malaperis, ili iris tra pina arbaro, pasis ne pli ol kvin minutoj, sed tri rozkoloraj sunsubiroj jam finbrulis super ili kaj trifoje leviĝis kaj subiris la flava luno. Post ĉiu arbo, kiun ili preteriris, tumultis blankaj ombroj. Jen gnomoj kun verdaj ĉapetoj elprenas trezorojn, kaŝitajn en la tero, — ruĝajn rubenojn, en kiuj brilas la sunsubiro, malhelajn, mortajn, kiel nokto, safirojn. Kaj jen de la arbobranĉo subensaltas homo kun ligitaj al la dorso paperaj flugiloj. La flugiloj ŝiriĝas kontraŭ branĉoj, kaj li falas surteren.

La sekva arbo, post kiu sidas Merlin, la magiisto, egale apartenanta al la bono kaj al la malbono, densaj ombroj ŝanĝas unu la alian sur lia laca vizaĝo. Arbara sorĉistino Vivian kantas al li siajn kantojn, kaj jen ŝiaj fleksemaj brakoj ĉirkaŭas lian korpon, kaj la lipoj, kiujn li tiom pasie kisadas, jam flustras super li la sorĉpeton pri eterna dormo. Pli kaj pli rapide anstataŭas unu la alian tago kaj nokto. Sin preminte al la korko de la alia arbo, sidas grizbarba oldulo kaj per tremanta mano strekas sur peco de pergameno “mi apostatas” kaj levas al la ĉielo duonfrenezajn okulojn, kvazaŭ delire ripetante: “Sed tamen ĝi turniĝas… ĝi turniĝas… alimaniere ne eblas… turniĝas”. Nova sunsubiro, nova

aŭroro, arĝenta neĝo kovras la teron. Ĝi iel similas cindron. Kaj efektive, nemalproksime etendiĝis forbrulinta urbo, pli ĝuste, ombro de forbrulinta urbo inter arboj. Romprestaĵoj de brikaj muroj, pecoj de torditaj lignaĵoj, kaj super ĉio ĉi ŝvebas cindro. Nova sunsubiro, nova sunleviĝo, la neĝo degelas, tintetas degelgutoj, post la sekva arbo ridas infanoj, lasante en la rojon ŝipeton, faritan el ĵurnalo. La ĵurnalo estas datita de aprilo 2010.

— Inga, kio estas tio!? — Tim pene rekaptis la spiron.

— Historio de la mondo, Tim. Vera historio de la mondo.

— Kiusence, vera?

— Ankaŭ ĝi trairis la nebulon de la memoro, restis nur tio, kio efektive gravis.

La arbaro finiĝas same subite, kiel komenciĝis. Tago kaj nokto ĉesas ŝanĝadi unu la alian. Finbrulas ordinara tago, densiĝas la ombroj, rozeta lumo de la sunsubiro karesas lacajn okulojn.

— Mi ja diris, Tim. La tempo estas sufiĉe relativa aĵo. Ĉi tie ĝi jam ne estas, ĉi tie estas eterneco.

Antaŭ ili estas spegulo, malnova, malheliĝinta pro la tempo, en ĉizita framo. Post ĝi — kverko, kverko, ĉirkaŭita de tia netera lumo, kverko, tiom antikva kaj belega, ke Tim unuafoje en la vivo volis fali sur genuojn kaj ekkredi, ke ie, eble, ĉi tie, tute apude, efektive vivas Dio.

Inga surgenuiĝas, leviĝas kaj iras antaŭen. Ŝi iras facile kaj ĝoje, kvazaŭ antaŭe staras ŝia malnova bona konato, pri kiu ŝi tre forte sopiris. Por momento al Tim ŝajnas, ke ŝia korpo iĝis senpeza, tiel facile ŝi iras, tiel hele kaj ĝoje ridetas. Akra, kruela malĝojo penetras Timon. Kial li ne povas same rideti? Kio en li estas ne lasanta lin simple esti feliĉa? Tim treege volas veni al la kverko, tuŝi la oran varman korkon, sed io interne malhelpas, li sentas nur necertecon kaj timon.

— Inga, mi atendos vin apud la spegulo.

En la spegulo li vidas sian reflektaĵon — pensemaj brunaj okuloj, longaj haroj, iom ĉifita ĉemizo, sed la apenaŭ rimarkebla por okuloj reflektaĵo ekŝanĝiĝas. Jen antaŭ li estas romia militestro en brila armaĵo, ĉifonvestita almozulo sur placo antaŭ pompa gotika katedralo, murdisto kun sangumita tranĉilo en la mano, reĝo, dancanta en balo. Ŝanĝiĝas ankaŭ vizaĝesprimo,

ŝanĝiĝas nerekoneble, nur kore Tim komprenas, ke tio estas li. Li nebule, fore, sed tamen memoras. Inga tuŝas lian ŝultron.

— Tio estas miaj antaŭaj vivoj, la dua cirklo de la estado, ĉu?

— Preskaŭ. Ĉio ĉi estas tio, kio vi estis, estos aŭ povas esti.

Tim flankeniĝas. Nun en la malhela spegulo reflektiĝas Inga, sed ŝiaj respeguliĝoj ŝanĝiĝas preskaŭ nerimarkeble. Blankan robon kaj kverkan kronon de kelta pastrino ŝanĝas monaĥina vesto, ĝin anstataŭas leda jako kaj ŝirita ĵinso, sed la ĉefa — la vizaĝo, okulesprimo, entute ne ŝanĝiĝas.

— Kial mi apenaŭ rekonas min, kaj vi entute ne ŝanĝiĝas, Inga?

— Mi ne povos klarigi, pardonu min, Tim. Mi provos montri al vi. Hodiaŭ, post la luna eklipso. Simple, ekzistas aĵoj, kiujn ne eblas forgesi, kiom ajn da vivoj ni travivu.

Tim transmetas la rigardon de la spegulo al Inga mem. Branĉoj de la maljuna kverko kuŝas sur ŝiaj ŝultroj, brakumas ŝian korpon.

— Tempas, ni preskaŭ venis.

Inga glatumas brilajn verdajn foliojn, por adiaŭo la kverko susuras, kvazaŭ pro vento, movetas la branĉojn, pli firme brakumante Ingan. Io simila al ĵaluzo leviĝas en la animo de Tim, sed tuje malaperas. Inga apartenas al li, ŝi plu iros kun li. Ili iras plu, antaŭ ili aperas nova nebula nubo, nun jam nigra, de ĝi blovas samtempe ardo kaj frosto, vivo kaj morto, ombroj kaj lumo ludas sur ĝi, kiel ili ludis sur la vizaĝo de Merlin. Tim sentas, ke ĝuste tie, interne, estas abismo, la Abismo, kie naskiĝas ĉio: homoj, steloj, fantomoj, rufaj papilioj, koŝmaroj, floroj, malpleno kaj Dio.

— Ja vi iros kun mi, ĉu vere, Tim? — Inga etendas al li la manon. Sed li ne reagas al tiu gesto, li sidiĝas sur la herbaron kaj ŝirmas la vizaĝon per la manplatoj.

— Mi estas poltrono, Inga, mi ne povas.

Inga sidiĝas apude kaj firme brakumas lin. Poste ŝi elprenas el poŝo kandelrestaĵon.

— Bonvolu bruligi por mi kandelon, tie estos mallume.

La kandelo ekbrulas per ĝoja, hela lumo. Superinte la netolereblan doloron en la brusto, Tim vidas, kiel de ie subite elflugas rufa papilio, flirtas en la aero kaj malleviĝas sur la ŝultron de Inga. Poste ili ambaŭ

malaperas en la nigra nebulo. Kaj ie profunde de lia animo naskiĝas la kompreno, ke tuŝi la Kverkon aŭ eniri tiun nebulon estus multe pli grave, ol serĉi finon de la Vojo. Li denove mallevas la vizaĝon en la manplatojn kaj lasas la larmojn libere flui. Kaj kiam sur ankoraŭ hela ĉielo leviĝas pala luno, post la nebula muro aperas brila, varmiga kaj trankviliganta la animon lumo, poste el malantaŭ la nebulo aperas eta violkolora stelo, kaj post ĝi eliras laca, kvieta, feliĉa Inga. Post kelkaj momentoj Tim komprenas, ke ili staras sur la Vojo laŭ la maro kaj ĉirkaŭe videblas nur karesaj varmaj ondoj.

***

Ili longe sidis silente, kun plezuro fiksaŭskultante konatajn terajn sonojn, bruon de maro, susuron de vento. Ofendiĝo kaj honto lasis Timon, li denove kredis, ke li elektis korektan vojon. La Vojo denove vokis lin, mole kaj karese brilis. Ankaŭ la vizaĝo de Inga vigliĝis, la profunda, preskaŭ neeltenebla feliĉo cedis al laco, kaj en la rigardo reaperis infaneco kaj fidemo. En varma aero super ili lante flosis violkolora stelo.

— Ĉu vi jam povas rakonti al mi, kio estis tie, kaj kio estas tiu stelo?

— Tie estis Abismo. Vi iam ekvidos ĝin, almenaŭ ensonĝe, kaj komprenos. Sed ĝi estas stelo. Ĉu vi memoras fabelon pri du animoj? Ĝi estas nia stelo, Tim, via kaj mia, kaj neniu forto en la mondo jam kapablas ĝin dividi.

— Pardonu min, Inga, se mi ofendis vin matene. Mi volas ekscii vian veron. Mi simple timas, ke ĝi ekplaĉos al mi pli, ol la mia, sed tiel ne eblas. Mi elektis mian vojon.

— Mi scias, Tim, vi timas, ĉar vi ne tute certas, — mi komprenis tion laŭ via reflektiĝo en la spegulo.

Kaj al Tim ekŝajnis, ke io lasta, dividanta ilin, falis por ĉiam, rozkolora rebrilo de luna ŝtono dancis sur ridetantaj lipoj de Inga. Tim sin klinis al ŝi, kun mallaŭta susuro la robo glitis de la ŝultro. Kaj malaperis, kiel tiam ĉe la kverko, viciĝo de tago kaj nokto, somero kaj vintro. Kaj unuafoje en la vivo al Tim ekŝajnis, ke tempo efektive ne ekzistas. Kaj tiutempe laŭlonge de la strieto de la Vojo super la maro flugis violkolora stelo, rigardante al la mondo ilia, de Tim kaj Inga, per la okuloj, okuloj de iliaj animoj.

Juna artisto staris sur sabla malprofundaĵo kaj glatigis muron de la sabla kastelo. La stelo dum kelkaj sekundoj ŝvebis super lia kapo, admirante la laboron. Poste li rimarkis ĝin, kaj, kaptita de la nova ideo, kolektis manplenon da rufa malseka sablo, skulptis el ĝi kolombon kaj forlasis, liginte letereton al la piedo. La stelo flugis post ĝi, gardante, ke la kolombo ne perdu la vojon.

Akompaninte la kolombon al Lejla, la stelo revenis al la lanterno, kie, volviĝinte kiel komforta buleto, dormis Sanktulino. La stelo ekpendis super ŝi, kaj ŝi sonĝis, kvazaŭ ĉiuj ŝiaj fantomoj reiĝis homoj, sidas kun ŝi ĉe la tablo kaj trinkas herban teon el brilanta samovaro. La stelo ĉirkaŭflugis ĉiujn ŝiajn fantomojn kaj bruligis iliajn kandelojn, por ĝi tio estis tute ne dolora.

Maljuna sinjoro en multekosta kostumo laciĝis iradi laŭronde, li eksidis sur la erikan deklivon de la insulo kaj elprenis cigaron, sed tiu ne ekbrulis malgraŭ liaj penoj. La stelo flugis pli proksimen kaj la cigaro ekbrulis.

— Tamen, eble, mi efektive iru antaŭen? — diris li al si mem. — Eble, tie mi almenaŭ fajrigilon aŭ alumetskatolon sukcesos trovi?

La matematikisto laboris super la sekva tasko, jen kaj jen reflustrante:

— Tio ne povas esti, mi kalkulis, science pruvite.

Subite sur la kvadratitan kajeron trafis radio de viola lumo, kaj ĉiuj formuloj kaj ciferoj konfuziĝis, intermiksiĝis kaj kuniĝis en unu frazon: “Sed, eble, vi scias ne ĉiujn ciferojn?”

— Kaj efektive, se tamen? — la matematikisto gratis la nukon.

Kaj la stelo jam enflugis la kaĝon de la junulo-memmortiginto, li tuje rimarkis ĝin kaj submetis sian palan magran vizaĝon al la violaj radioj. Kelkajn minutojn li varmiĝis en ili, kaj poste diris preskaŭ laŭte:

— Sed ja efektive indis vivi, almenaŭ simple pro tio, ke eblus submeti la vizaĝon al la suno kaj senti ĝian varmon.

Kaj samsekunde la kaĝo malaperis, kaj la junulo brue falegis sur la helan strion de la Vojo, ĝissange vundinte la jam ne travideblan genuon.

***

Plena, ankoraŭ flava luno lumas tiel hele, ke mem la malhela maro brilas, submetante al la sorĉa lumo glatan nigran dorson. Aŭgusta ĉielo trembrilas kaj scintilas per miloj, miriadoj da etaj altaj steloj, kaj la loganta per io bona, ekde eterne kara, Lakta Vojo subiĝas al la horizonto mem, ĝuste en tiu loko, kie devas finiĝi la Vojo laŭ la maro. Kaj unu stelon, varman, plej helan, falintan kaj reviviĝintan denove, Tim tenas en la manoj. La stelo rebrilas roze kaj arĝente, per sia, sed iom simila al la luna, lumo.

— Povas esti, — Inga prenas Timon je kubuto, — ĝi estas la unua en la mondo stelo, kiu vivos kaj lumos ĉi tie, sur la Tero. Kaj, povas esti, ili estas miloj, kaj ili varmigas kaj lumigas hejmojn dum mallumaj aŭtunaj noktoj, donacas lumon al infanaj okuloj kaj sonoron al kampanuloj.

Tim silentas, glutante nepetitajn larmojn. Li eĉ ne plu penas ion kompreni. Ĉio, kion li komprenis, ĉio, per kio li vivis, malaperis, vanuis kaj solviĝis en la venanta de ĉie travidebla, stela aŭgusta lumo.

Malhela ombro, ombro de la tero malrapide ekrampis sur la lunon, preskaŭ nerimarkeble por okulo, ĝi, obskura, netravidebla, iel memoriganta Koŝmaron, rampis, glitis per kroĉemaj, gluemaj piedoj sur flava luno. Ie post horizonto ekflamadis kaj estingiĝadis fulmoj de la fora ŝtormo. Kaj jen de la luno jam restis nur eta randeto de la hela lumo. Inga rigardas al tiu lumo, ne moviĝante, eĉ pormomente ne fermante la okulojn, ŝi tremas per la tuta korpo. Tim brakumas ŝiajn ŝultrojn.

— Ĉu malvarmas?

— Ne, — Inga leĝere, enigme ridetas. — Ja mi estas sorĉistino, mi ne povas sen la luno. Mi timas. Senkomprene, trankvile, timas. Ĉu vi vidas, la ŝtono sur la kolo ne plu lumas?

Ŝia blanke-blua lunŝtono efektive estingiĝis kaj ne plu ĵetas rozan lumon sur ŝian haŭton. Ankoraŭ kelkajn sekundojn la sonora, atendanta silento pendas super la Vojo.

Poste enfore glitas kaj malaperas ĉehorizonte eta stelo.

— Ĉu vi vidas? — Inga la unuan fojon moviĝis, turnis la vizaĝon al Tim. — Ankaŭ tiu ĉi stelo havos

ŝancon reviviĝi sur la tero kaj lumigi ĝin, lumigi elinterne ies okulojn, bruligi kandelojn, kiuj ebligas vidi, kiel brilas subpiede la Vojo laŭ la maro…

Kaj, kvazaŭ respondante al ŝiaj vortoj, de la ĉielo ŝutiĝas steloj, kiel netera, ekscitanta imagon aŭgusta stela pluvo. Senforta ombro triste deglitas de la nun jam hele-blanka luno kaj moviĝas al sia hejmo, en malplenon, en nenion, kie ĝin atendas fulmorebriloj, Koŝmaro kaj nokta fulmotondro. Tim komprenas, ke venis tiu sekundo, kiam la mondo malkovros al li la veron de Inga. Kaj efektive, la Vojo ekflamas pli hele, kaj ĝia lumo disfluas jam ne je du partoj, sed al la tuta grandega nokta maro. Abrupte saltinte de la loko, Inga kuras antaŭen, laŭ brilantaj glataj ondoj, la vento, disŝirinta la silenton, movas lanugecajn rufajn buklojn, ĝi haltas, turniĝas surloke, kaj ĉirkaŭ ŝi kiel sorĉaj flametoj turniĝas kelkaj rufaj, same rufaj, kiel ŝiaj haroj, tagaj papilioj. Tim ne scias, de kie ili aperis, Tim ne plu ion scias, sed li desaltas de la Vojo, li ne dubas, ke la maro kuŝiĝos sub liajn piedojn, ĝojos kaj brilos. Inga prenas lin je la manoj, kaj ili turniĝas, ĝis la tuta mondo de aŭgusto, maro kaj steloj iĝas por ili unu komuna rondodanco, kie jam ekzistas nenio, kie jam estas ĉio.

***

Tim malfermis la okulojn kaj rigardis al la varma, helblua en ombro, ora subsune maro, poste al profunde dormanta Inga, preminta lian manon al sia brusto, ŝi ĉiam tiel dormis. Tim penis ne moviĝi por ne veki ŝin. La violkolora stelo pendis enaere super ili, lumigante la Vojon, nemalproksime antaŭe staris pordo, kaj io sufloris al Tim, ke ĝi estas la lasta. Post ĝi la ankoraŭ videbla, kvankam tre pala, Vojo transformiĝis je ŝtupoj, ili gvidis supren. La Vojo havas finon, kaj ĝi estas tie, post kelkaj paŝoj.

— Vi havas la tutan mondon, Tim. Sed vi limigas ĝin je unu sola, streta vojo…

— Mi ĉiam havis mondon, sed ĝi nenion donis al mi. Sed la Vojo donis, — Tim ne plu kredis al tio, kion li diris. Li diris, ĉar tiel estis necese.

— La Vojo donis al vi okulojn, jen ĉio. Nun vi povas ekvidi, kiel ĉiu momento, travivita de vi, ĉiu momento, prilumita kaj akceptita per la kandelo de via animo, forpasas en eternecon. Kaj ĉiu el tiuj momentoj estas simila vojo, vojo laŭ la maro. Ni havas stelon kaj mondon, Tim.

— Inga, mi trairis tiun ĉi vojon, kaj la antaŭan pordon mi malfermis per tio, ke mi agnoskis: en la mondo estas nur soleco. Neniu iun iam ekkonos kaj komprenos.

— La sekva pordo aŭdas vin, sed ĝi estas fermita.

Inga subite saltleviĝis kaj same, kiel hieraŭ, ekkuris laŭ la akvo, kaj poste, kvazaŭ laŭ ŝtupoj, laŭ la penetrita de suno aero.

Kaj subite Tim kaptis sin ĉe la penso, ke la hieraŭa sento ne lasis lin. Sen doloro, sen pezo, sen spuro la animon lasis la kredo je soleco, kaj kiel hieraŭ en la tuta mondo, hodiaŭ en lia animo estis nenio. Estis ĉio. Inga staris super la akvo, la stelo alflugis al ŝi kaj duone dronis en la molaj rufaj haroj.

— Sed ja vi mem diradis: la momento povas foriri en eternecon, nur se lasi ĝin, se ne provi ligi ĝin, entiri. Aliokaze ĝi apartenos al la tempo.

— Stulteta, — Inga ekkaŭris kaj karesis liajn rektajn blondajn harojn. — Vi eĉ ne rimarkis, ke la tempo foriris hieraŭ, kune kun la ombro sur la luno, por silente dormi en malpleno, ĉar ĝi estas senforta. La tempo mortis por ni, mortis por ĉiam kaj ne plu revenos, Tim.

Tim turniĝis kaj malrapide iris al la pordo. Inga malsupreniĝis kaj prenis lin je la brako. Li jen kaj jen fermadis la okulojn, spasmece penante elpensi almenaŭ unu kaŭzon, pro kiu li ne povas preni la manon de Inga kaj kuri laŭakve, elpensadi oranĝkolorajn papiliojn kaj teni ilin sur fingropintoj. Inga iris, metinte la kapon sur lian ŝultron, iom estingiĝis la okuloj, ŝi jam komprenis, ke Tim foriros, kaj ŝi ne malhelpis lin. Iam ŝi promesis lasi lin, kaj nun ŝi lin lasas. Tim iris ĝis la pordo. "Fermu la okulojn, rememoru la Vojon kaj diru, kion vi komprenis pri ĝi, trairinte ĝian lastan parton". Ĉion kaj nenion. Tim ne sciis la vortojn, per kiuj oni povas esprimi ĉion. Tial Tim silentis. Pasis kelkaj minutoj.

— Ĉirkaŭiru la pordon, Tim, ja nun vi tion scipovas.

Ŝi levas la kapon, etendas la manon, donas al li la stelon.

— Ja ĝi estas ankaŭ via animo, Inga.

Ŝi forturniĝas, li ne devas vidi ŝian vizaĝon, ŝi promesis ne reteni lin kaj ne retenos.

— Mi ja estas sorĉistino, kiucele mi bezonu mian animon? Nian animon… Mi havas la mondon, maron, stelojn kaj rufajn papiliojn.

Tim estis foriranta. Li nur ne returniĝu, ne permesu al si tiun malfortecon. La Vojo estas lia sorto. La Vojo havas finon, al kiu Tim baldaŭ venos. Unu penso subite ekflamis en la kapo tiel furioze, ke stumblis la piedoj. Kaj se ankaŭ lia Inga iĝos fantomo de la Vojo, ŝia kara korpo iĝos malvarma, travidebla, estingiĝos la okuloj, ĉesos brili la lunŝtono. Ĉu ŝi evidentiĝis esti, kiel ĉiuj, tro malforta? Aŭ ĝuste li, la plej saĝa kaj kuraĝa Tim, eraris, eraris senreturne? Eble, ĝuste lia korpo jam iĝas travidebla. Kaj tamen kiuj vortoj estis malfermantaj la lastan pordon?

***

Ĝuste en tiu minuto, per unu mano forŝirante de si la kravaton, per la alia ĵetante en la maron jam ne plu bezonatan kajeron, laŭ la Vojo kuras Matematikisto. La lasta pordo atendas lin:

— En la mondo nenio povas ekzisti, mi kalkulis. Sed en la mondo ekzistas ĉio: la Vojo laŭ la maro kaj la maro, iĝinta Vojo, la soleco, kiu okupis la tutan mondon, kaj senfineco, kiu rompas la solecon, kaj aŭgusta stela pluvo, kaj senforteco de la tempo. Ĉio, ĉio, ĉio!

Apenaŭ ne forfalinte de la ĉarniroj, la pordo malfermiĝas antaŭ li, kaj li kuras plu.

***

Ĝuste en tiu minuto la tenere-ora lumo de la Vojo inundas la tutan maron, mondan oceanon, teron, arbarojn, dezertojn, aeron. Kaj laŭ tiu mondo, facile, turniĝante, saltetante, ridante, kuras Inga, kaj la feliĉa suna mondo estas ekbrakumonta ŝin, turnante ĉirkaŭ ŝi rondodancon de papilioj, folioj, floroj. Ŝi neniam plu haltos, la animo de la suna mondo, transformiĝinta por ŝi sola en senfinan vojon, iĝis ŝia animo, ili kune kantas lulkanton al la por ili ekdormanta por ĉiam tempo.

***

Ĝuste en tiu minuto, sendevie sekvante la Vojon laŭ la maro, super la nuboj leviĝas Tim. Ŝtupon post ŝtupo. La violkolora stelo flugas apud li. Kaj jen sub liaj piedoj kuŝas lanuga nubo, super li en la violkolora ĉielo rebrilas la ĉielarko. Sur ĝia kolora dorseto dormas blua somera pluvo, iom pli supre interparolas steloj. Antaŭe estas nubo da blankaj fajreroj. Fino de la Vojo.

Kio estas post ĝi? Ĉu nigra truo, en kiu sin kaŝis malpleno? Ĉu alia mondo? Senfina universo kun miloj da steloj kaj galaksioj? Aŭ gepatra hejmo — ja la fino kaj la komenco ĉiam similas.

Jen ankaŭ la ĉielarka mara drako distranĉas la nuban nebulon kaj impete preterflugas.

Kio estas tie, post la nebulo de blankaj akveroj?


Fermu la okulojn. Faru paŝon.

Vi staras sur la Vojo, kiu gvidas laŭ la maro.

Kio estas tie, post blankaj akveroj?

Ĉu vi povas doni respondon?

**Viaj komentoj kaj recenzoj estas bonvenaj en gasta libro de retejo www.fabelo.trovu.com, aŭ skribu al e-poŝto retumanto@gmail.com**



*Литературно-художественное издание*

**Шевченко Дмитрий Александрович**
**Стриганова Анна Олеговна**
**ДОРОГА ПО МОРЮ**
Сказочная повесть

*На языке эсперанто*

Издательство «Импэто», Москва, 117593, Литовский б-р 13/12.
E-mail: impeto@impeto.ru; WebSite: www.impeto.trovu.com

ISBN 978-5-7161-0197-5